

Reta Komitatkunsido de TEJO

1a sesio de la Komitatkunsido	3
1. Malfermo	3
2. Proponoj pri Voĉdona Komisiono kaj Propona Komisiono	3
a. Voĉdona Komisiono	3
b. Propona Komisiono	3
3. Fikso de cetera tagordo	4
4. Bonvenigo de la novaj Komitatanoj	4
5. Elekto de Komitatanoj Ĉ (1 loko)	4
a. Sinprezento de kandidatoj	4
b. Demandoj al la kandidatoj	5
6. Enkonduko de la Estraro pri la Strategia Plano, Realigplano kaj Buĝeto kun demandsesio (30min)	5
7. Laborgrupoj pri Strategia Plano	7
Ĉambro 1 Tutmonda	7
Ĉambro 2 Esperantista	9
Ĉambro 3 Junulara	12
Ĉambro 4 Organizo	13
8. Laborgrupo pri Buĝeto	15
2a sesio de la Komitatkunsido	18
1. Unua rondo de laborgrupoj pri Realigplano	19
Ĉambro 1 Funkciado	19
Ĉambro 2: Aktivula Trejnado kaj Projektoj	20
Ĉambro 3: Edukado, Scienco, Kulturo	22
2. Dua rondo de laborgrupoj pri Realigplano	23
Ĉambro 1 Talento, Egaleco	23
Ĉambro 2 Kongresoj	25
Ĉambro 3 Merkatiko kaj Informado	26
3. Tria rondo de laborgrupoj pri Realigplano	27
Ĉambro 1 Eksteraj Rilatoj	27
Ĉambro 2 Landa kaj Faka agado	29
Ĉambro 3 Financoj	32
3a sesio de la Komitatkunsido	33
1. Amendoj al la Buĝeto	34
2. Amendoj al la Realigplano	34
a. Raporto de la laborgrupoj pri la amendoj	34
b. Proponoj de amendoj	35

3. Voĉdonoj pri la Realigplano	37
4a sesio de la Komitatkunsido	40
1. Amendoj al la Strategia Plano	40
2. Ŝanĝproponoj al Reglamento	41
a. Debatoj pri la proponoj	41
b. Voĉdonoj pri la proponoj	42
3. Aliaj temoj	44
4. Ceteraĵoj	44

1a sesio de la Komitatkunsido

22an de novembro 2020

12:00 - 16:00 UTC

Unu horon antaŭ la komenco de la kunsido Francesco Maurelli malfermis la Zoom-ĉambron kaj poste, kune kun la CO-volontuloj, komencis enirigi la partoprenantojn kaj kontroli iliajn identecojn per video.

[Listo de partoprenantoj](#) (vidu "Konfirmo de volontulo pri efektiva partopreno").

1. Malfermo

La Prezidanto de TEJO **Charlotte Scherping Larsson** malfermas kaj enkondukas la unuan sesion de la reta Komitatkunsido.

Estas proponata **Francesco Maurelli** kiel kunsidestro; neniuj havas ion por komenti kaj do oni iras rekte al voĉdonado pri tio. Dume la prezidantino klarigas, ke kaze de ĉeesto de ne-Komitatanoj ili devas esti formetitaj de la kunsida ĉambro por ke la voĉdono okazu.

Voĉdono: Francesco Maurelli estos kunsidestro.

- 21 voĉoj por
- 0 voĉoj kontraŭ
- 3 voĉoj sindetenaj

2. Proponoj pri Voĉdona Komisiono kaj Propona Komisiono

a. Voĉdona Komisiono

Ne alvenis proponoj antaŭ la kunsido. Francesco proponas ke Konstanze (Ĝenerala Sekretario) kaj Tobiasz (Komitatano A, Pollando) estu en la voĉdona komisiono.

Voĉdono: konsisto de la Voĉdona Komisiono estas aprobita:

- 28 voĉoj por
- 0 voĉoj kontraŭ
- 0 voĉoj sindetenaj

b. Propona Komisiono

Ne alvenis proponoj antaŭ la kunsido, do oni invitas la Komitatanojn sin kandidatigi por tiu posteno. **Michael Boris Mandiroła** (Komitatano B) kaj **Michal Matúšov** (Komitatano A, EUROKKA) sin proponas.

Voĉdono: konsisto de la Propona Komisiono estas akceptita:

- 28 voĉoj por
- 0 voĉoj kontraŭ
- 0 voĉoj sindetenaj

3. Fikso de cetera tagordo

- **Michael Boris Mandirola (Komitatano B)** rimarkigas ke en la tagordo de la 4a sesio la traktado de la propono 1 de **Robert Nielsen** (eks-komitatano) kaj de la sia (ambaŭ amendoj al la Reglamento pri la uzo de horzonoj por kunvenoj) estas apartigitaj aferoj kaj li proponas kunigi ilin, ĉar ili pritraktas komunan temon.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** akceptas la proponon.

Voĉdono: La proponita tagordo estas aprobita

- 28 voĉoj por
- 1 voĉoj kontraŭ
- 1 voĉoj sindetenaj

4. Bonvenigo de la novaj Komitatanoj

Ne ĉeestas novaj Komitatanoj, do oni iras rekte al la sekva tagordero.

5. Elekto de Komitatanoj Ĉ (1 loko)

a. Sinprezento de kandidatoj

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Restas 1 vaka loko por komitatano Ĉ, por kiu konkurencas: **Manuela Burghilea** (Rumanio/Skotlando) kaj **Snehaĝa Venkatesh** (Barato).
- **Carlos (Vicprezidanto)** priskribas ĉefajn kvalitojn kaj spertojn de ambaŭ kandidatoj.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** ricevis skribe konfirmojn de ambaŭ pri iliaj kandidatiĝoj. Ŝi volas aŭskulti sinprezenton de ambaŭ kandidatoj kaj demandojn de la Komitato.
 - **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado)** sin prezentas: Eksa volontulo ĉe TEJO kaj ĉe Esperanto-Kultur-Centro (Tuluzo), ŝi estas nun membro de la komisiono pri Edukado, Scienco kaj Kulturo, ankaŭ okupiĝas pri la esperantlingva versio de la retejo Tutmondaj Voĉoj.
 - **Snehaĝa (Komisiito pri Scienco)** sin prezentas: Ŝi estas ĥemiisto, laboras kiel scienckomunikisto kaj estas en la interesgrupo pri scienco.

b. Demandoj al la kandidatoj

1. **Michael Boris (Komitatano B)** (Al ambaŭ kandidatoj) Ĉu estas iu ŝanĝo kiun vi deziras porti al la Komitato, aŭ ĉu via kandidatigo temas nur pri bonvolema volo?

Snehaĝa (Komisiito pri Scienco): Pensas pri pli da engaĝigo, sed ne pensas pri ŝanĝoj.

Manuela (Komisiito pri Universitata Agado): Volas pli da inaj voĉoj en la Komitato kaj intencas plu okupiĝi pri universitata agado.

2. **Carlos (Vicprezidanto):** Ĉu vi povas daŭre laboregi en viaj komisionoj kaze de elekto kiel komitatano?

o **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado):** Kredas ke ŝi plu bone laborados kaze de elekto.

o **Snehaĝa (Komisiito pri Scienco):** Ankaŭ kredas ke eblos daŭre labori.

3. **Hyun Kyu (Komitatano Ĉ)** legis ie, ke **Snehaĝa** (Komisiito pri Scienco) naskiĝis en Srilanko, sed nun aperas ke ŝi estas el Barato. El kie vi venas?

o **Snehaĝa (Komisiito pri Scienco):** Estas el Barato, tie naskiĝis kaj kreskiĝis.

o **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Klarigas ke Hinda Unio estas la nomo kiu aperas en la datumbazo de UEA, kvankam tio estas ŝanĝinda.

- **Carlos (Vicprezidanto):** Proponas ke oni lasu pli da tempo por ke homoj demandu libere.
- **Francesco (Kunsidestro):** anoncas ke okazos voĉdonado pri la posteno de Komitatano Ĉ kaj petas komentojn pri la maniero adoptenda por la voĉdono.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** kredas ke oni povos lasi la kutimon tiel kiel ĝi estis kaj akceptas sekvi la kutimon de la lastjulia Komitatkunsido, do okazigi 24-horan voĉdonadon fine de la hodiaŭa sesio.

6. Enkonduko de la Estraro pri la Strategia Plano, Realigplano kaj Buĝeto kun demandsesio (30min)

Pridiskutotaj dokumentoj:

- [Realigplano](#)
- [Strategia Plano](#)
- [Propono de Buĝeto 2021](#)

Komenciĝas per komuna enkonduka parto kaj poste pli specifiĝas en subĉambraj laborgrupoj.

Oni gratulas **Paulina** (Oficisto) pro ŝia elstara elekto en la estraro de la Eŭropa Junulara Forumo, dankas la respondecajn pri Eksteraj Rilatoj.

- **Charlotte (Prezidanto):**

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- La strategia plano celas doni strategion por la estonta laboro, ankaŭ de la ontaj estraroj.
- Krom orienti nian propran agon longdaŭre, ĝi ankaŭ gravas por interrilati kun eksteraj organizoj, ekzemple por peti subvenciojn.
- Ĝi ankaŭ estos tradukita anglen por ke ĝi pli bone utilas en eksteraj rilatoj.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):**
 - Enkondukas en la Realigplanon kaj emfazas, ke temas pri ĉies laboro.
 - La nuna propono estas la rezulto de unumonata laboro de ĉiuj - de volontuloj ĝis la prezidanto.
- **Mung (Kasisto)** klarigas pri la rimedoj de TEJO, pri kio ŝi laboras kun **Tomáš** (Vicprezidanto) kaj **Paulína** (Oficisto).
 - Venontjare TEJO havos malfacilaĵojn, sed ŝi klopodos stabiligi la buĝeton.
 - La ĉefa afero estas malaltiĝo de la subvencioj kaj fino de kontrakto de oficistoj, ekzemple **Said** kaj **Paulína** (Oficistoj). IJK estas alia grava enspezo kiu eble ne okazos, tial estas maltrankvilige.
 - Ŝi planas malaltigi kostojn de la estraro kaj ankaŭ starigi kampanjon por amasfinancado.
- **Francesco (Kunsidestro):** Kiel utilos la angla versio de Strategia Plano?
- **Hans (Komitatano Ĉ)** demandas ĉu iam antaŭe oni jam tradukis la Strategian Planon en aliajn lingvojn.
- **Rogier (Estrarano)** respondas, ke la lasta Plano estis fakte tradukita en la anglan kaj de li mem en la nederlandan.
- **Hans (Komitatano Ĉ)** petas, ke la angla versio estu sendota, prezentota kaj aprobita de la Komitato.
- **Paulína (Oficisto):** TEJO bezonas anglan version de la plano ĉefe por peti subvenciojn de Erasmus+; estas grave ke la dokumento estas uzebla ekstere por demonstri la seriozecon de TEJO.
- **Charlotte (Prezidanto):**
 - Kiam ni finlaboris la Strategian Planon, ni povas plani la tradukon kaj prezenti ĝin al la Komitato por aprobo.
 - Hodiaŭ ne estas la lasta fojo kiam ni diskutos pri tiu dokumento. Eblas diskuti ĝin dum komitataj diskutoj kaj dum malfermaj horoj.
- **Rogier (Estrarano):** invitas ĉiujn partopreni diskutojn pri la Strategia Plano, ĉar ĝi difinas kia organizo TEJO esti, multe pli ol eblas en estrara mandato! Proponu viajn ideojn kaj vian vidpunkton.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Ĉu estontece eblos ke ankaŭ la membroj povas diskuti la specifajn erojn de la Strategia Plano?
- **Charlotte (Prezidanto):**
 - Jes, ni planis malfermajn horojn pri tio kaj aliajn temojn dum decembro.
 - Dum januaro kaj februaro ankoraŭ ne estas planitaj specifaj kunsidoj. Specife mi ŝatus vidi diskuton pri la strategia plano en komisionoj pri la komisionaj temoj.
- **Francesco (Kunsidestro):** Ebligas lastajn rimarkojn en la plena salono.

La Kunsidestro malfermigas la subĉambrojn kaj oni klarigas la temojn, laŭ la 4 kernaj sekcioj de la Strategia Plano:

- a. Ĉambro 1 (**Klára**, Estrarano) (50 minutoj) → Tutmonda
 - b. Ĉambro 2 (**Charlotte**, Prezidanto) (50 minutoj) → Esperantista
 - c. Ĉambro 3 (**Carlos**, Vicprezidanto) (50 minutoj) → Junulara
 - d. Ĉambro 4 (**Rogier**, Estrarano) (50 minutoj) → Organizo
- **Charlotte (Prezidanto)** klarigas, ke oni povas partopreni duone en unu ĉambro kaj duone en alia.
 - **Francesco (Kunsidestro)**: Oni havas tempon por diskuti kaj poste oni revenos al la komuna ĉambro, adiaŭas spektantojn en Jutubo.
 - **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** oficiale malfermas la unuan sesion.
 - Ŝi memorigas la Komitatanojn ke la ĉeesto en laborgrupoj estas bonvena sed ne deviga, invitante elekti saĝe kiel dediĉi sian energion.
 - Post la laborgrupoj pri Strategia Plano kaj Buĝeto, la sekvanta sesio okazos venontsemajne, sabaton la 28-an de novembro.

7. Laborgrupoj pri Strategia Plano

La laborgrupoj estas libervolaj kaj daŭras 90 minutojn. Jen ligilo al la [Strategia Plano](#).

Ĉambro 1 Tutmonda

Gvidas: Klára (Estrarano)

Ĉeestas: Hans Becklin (Komitatano Ĉ), Manuela Burghilea (komisiito), Albert Stalin Garrido (A), Shin Hyun Kyu (Mondero) (Komitatano Ĉ), Zhao Wenqi (Venki) (Komitatano Ĉ), Hiro Kawara (A), Nicolas Kasolene (Komitatano B), Cyprien Guiya (A), Miguel Bento (A), Karina (E), Klára (Estrarano/gvidas), Valentin (volontulo/protokolanto)

- Diskuto pri ĉefcelo: "TEJO estas tutmonda esperantista junulara organizo. En la jaroj 2021-2025 TEJO volas koncentriĝi pri la tutmondeco de la organizo kaj pri engaĝado de la landaj sekcioj de ĉiu kontinento en la agado de TEJO, en komisionoj, en projektoj, en kongresoj."
 - **Hans (Komitatano Ĉ)**: Ni ja faras ĉi tiun planon ĉar TEJO ankoraŭ ne estas sufiĉe tutmonda. Proponas ŝanĝi "estas tutmonda" al "estu tutmonda". Krome indas uzi pli fortan verbon ol "engaĝado", Li proponas anstataŭe "kunlaborigo".

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Diskuto pri celo 1: "TEJO strebas en sia agado la reprezenton kaj kunigon de vasta tutmonda junularo. Parto de tio estas starigo de egalecplano pri la kernaj agadoj de TEJO, kun fokuso pri tutmonda reprezentado kaj alireblo al kongresoj."
 - **Charlotte (Prezidanto)**: Ni starigu tutmondan egalecan planon por la venontaj jaroj: estas jam genroegaleca malneto de Charlotte, pluverkota de la egaleca komisiono.
 - Ĉu TEJO reprezentas nur la esperantistan junularon, aŭ ankaŭ la junularon ekster-esperantistan? Estas malkonsentoj pri tio:
 - **Cyprien (Komitatano A, Benino)**: Ni ankaŭ reprezentas ne-esperantistajn junulojn.
 - **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado)**: Ni ne reprezentas la junularon, ĉu esperantistan, ĉu ĝenerale, do ni forigu "la" → ŝanĝo al "vasta tutmonda junularo".
- "Reprezenti" sonas tro alekstera → aldoni "kunigas".
- Diskuto pri 1.a: "En la egalecplano estu difinata la starigo de egaligaj strukturoj, kiuj helpas al solvado de konfliktoj kaj packonstrua laboro en la movado, kiuj ankaŭ subtenas povigon de grupoj kun malavantaĝoj."
 - **Hans (Komitatano Ĉ)** proponas vortumon "egaliga" anstataŭ "egaleca". Alikaze ne klaras por homoj kiuj nek komprenas la anglan bone, nek havas fonon en junularpolitiko.
 - **Miguel (Komitatano A, Brazilo)**: La problemo ne estas "egaleca", sed la vorto "strukturo" mem ne klaras.
 - **Klára (Estrarano)** montras la malneton de **Charlotte** (Prezidanto) kaj klarigas ke la vorto "strukturo" rilatas al ĉiuj novaj praktikoj, kutimoj planitaj por ebligi egalecon.
 - **Miguel (Komitatano A, Brazilo)**: Tiukaze sufiĉas ke la koncepto "strukturo" estu klarigata en la egaleca plano mem.
- Diskuto pri "malavantaĝitaj": la vorto ne klaras. Provizora ŝanĝo al "grupoj kun malavantaĝoj", sed ne ĉiuj konsentas, do tio ankoraŭ estas prilaborinda.
- Diskuto pri 1.b: "La jaraj raportoj enhavu datumojn pri deven- aŭ loĝlando kaj genro de la partoprenantoj en agadoj, kongresoj kaj komitatkunsidoj, por ebligi komprenon de la reprezentado."
 - Demando laŭ komento de **Charlotte**: ĉu aldoni konkretajn numerojn, kiujn ni volas atingi?
 - **Miguel (Komitatano A, Brazilo)**: Necesas aldoni datumojn al la propono, tamen ne estas datumoj por antaŭaj jaroj. Ni ne povas scii al kio ni strebas, se ni ne scias kio estas la komenca situacio.
- Konkludo: La celo en strategia plano restu abstrakta, konkretaj datumoj estu en jarraportoj kaj mezureblaj celoj estu en Realigplanoj.
- Pri 1c "Kongresoj ĉiam enhavu retan partopreneblon; esplori kaj efektiviĝi pli da retaj servoj al la membraro."
 - Ne estas diskuto.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Diskuto pri 1.d&e: "Okazigi interkontinentajn projektojn, aldone al fizikaj renkontiĝoj, esplorante la retajn eblojn kunlabori kaj tiel plifortigi la lokajn movadojn."
"Unu evento organizita de TEJO ĉiun jaron ligita al malsama kontinento ekster Eŭropo dum 2021-2025. Ni kunorganizu lokajn kaj internaciajn kongresojn en la tuta mondo kaj uzu niajn komisionojn kaj nian fakan agadon por realigi tiajn celojn. TEJO varbu kaj subtenu organizadon de renkontiĝoj tutmonde. Okazu faka konsilado aŭ monsubteno pere de Fonduso Trampolino."
 - **Hans (Komitatano Ĉ):** TEJO profitas de eŭropa mono, tial ne estas granda subteno ekster ĝi. Estas problemo, ke "internaciaj projektoj" nepre devas inkluzivi Eŭropon, sed ne nepre alian mondoparton.
 - **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado):** Prave, ni devas koncentriĝi pri ekstereŭropiĝo.
 - **Nicolas (Komitatano B kaj komisiito pri Talento):** Kio pri Oceanio, kiu ne aperas en la plano? -> ŝanĝi "projektoj inter Eŭropo kaj [konkretaj mondpartoj]" al "interkontinentaj projektoj" ĝenerale
 - **Hans (Komitatano Ĉ):** "Interkontinentaj projektoj" eŭropaj ne estas sufiĉe inkluzivaj. La situacio estas, ke en Esperantujo ĉio iras tra Eŭropo, tamen ne devus esti nepre tiel.
 - **Hans** agnoskas, ke mankas mono al TEJO kaj ke pli facilas organizi eventojn en Eŭropo, sed ne konsentas ke kunlaboro temu nur pri "esplori retan kunlaboreblon" kaj "subteni" permone eventojn, TEJO devus mem organizi ilin. Tiuj TEJO-organizitaj eventoj kaj trejnadoj (foje paralele al IJK) povus okazi ekster Eŭropo.
- Konkludo: Ŝanĝi al "unu evento organizita de TEJO" kaj "ni kunorganizu" anstataŭ la verbo "subteni".

Ne estis tempo preparoli aliajn erojn.

Ĉambro 2 Esperantista

Gvidas: Charlotte (Prezidanto)

Ĉeestas: Tobiasz (Komitatano A, Pollando), Lucas (Komitatano A, Francio), Renato (volontulo/protokolanto)

- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando)** opinias TEJO-n pli vigla ol UEA kaj kredas ke oni devas profiti de tio por antaŭenirigi projektojn kaj Esperanton.
- **Charlotte (Prezidanto)** legas la Strategian Planon, substrekas la gravecon de disponebligo de facilaj informiloj.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Gravas, ke ni strebos por lingva diverseco, tiel disponebligi diverslingvajn versiojn de kelkaj dokumentoj. Kredas, ke oni devas liveri altkvalitajn informojn en la varbmaterioj por ke tio ne kontraŭefiku al la komunumo nun.
- **Charlotte (Prezidanto):** Kvalitkontrolo de materialoj gravas kaj zorgi pri diverslingvaj versioj.
 - (Legas la sekvan punkton). "Plivastigo de uzado de kanaloj uzataj por la komunikado de TEJO: sociaj retoj, videoj, specife por atingi ne-membrojn kun bunta resumo de la agado dum la jaro. Tio inkluzivas regulan raporton pri tio, kion TEJO faras por Esperanto - la lingvo kaj la kulturo."
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):**
 - Se oni bone scias kion faras TEJO, oni povas pli facile trovi sian lokon en ĝi. Mencias la Poznanan kurson en Pollando por prepari instruistojn, sed ĝi ne estas senpaga. Por stimuli, subvenciita partopreno estis starigita.
 - TEJO devus same fari, tio estas, trovi manierojn subteni sin kaj trovi subvenciadon en diversaj lokoj.
- **Charlotte (Prezidanto):** Ja estas tiu iniciato helpi instruadon en Esperanto en pluraj lokoj; multo okazis ekzemple en Afriko.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Strebi trovi aliajn aranĝojn kiel KAB? Kaj aliaj kulturaj aranĝoj, ideoj, podkasto, kaj aliaj interesaj ideoj. Ankaŭ profiti de la pandemio, homoj ekfaras pli da materialoj pro la kvarantenigo kaj TEJO povos pli aktive diskonigi tion.
- **Charlotte (Prezidanto):** Petas pli da detaloj.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Temas pli pri kunordigi jam ekzistantajn aferojn aŭ transpreni aferojn, kiuj jam okazis. Fokusiĝi je aferoj kiuj rilatas pli klare al la junulara movado.
- **Charlotte (Prezidanto)** aldonis kelkajn punktojn de li proponitajn - varbado, informilo, ankaŭ per Kontakto ĉar ĝi estas grava en Esperantujo.
- **Charlotte (Prezidanto)** invitas al la sekvonta temo.
 - Proponas ke oni elektu temon por pli profunda sindediĉo dum specifa jaro. Ekzemple: Genro kaj Egaleco, Daŭripova evoluo.
 - Eventuale, povas esti kongruo de tiu temo kun UN temoj. Kion oni pensas pri enkonduko de jartemoj?
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando)** tre ŝatas la ideon.
 - Sed pensas ke la lokaj renkontiĝoj ĝenerale elektas la temon laŭ la lokaj cirkonstancoj, kaj tio povas esti tre bona.
 - Do tiu kunordigo devas esti bone elpensita.
- **Charlotte (Prezidanto)** bezonas havi temon por la necesaj diskutoj por paraleligi la IJK-temon kun la jartemoj por ke estu harmonio.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando)** kredas ke tio postulus 5 jarojn por ke tiu tradicio estu enradikiĝinta. Tio povas esti efika ĉe eksteraj rilatoj de TEJO.
- **Charlotte (Prezidanto)** ne vidas sencon por elekti tiujn temojn por la venontaj jaroj nun; sed por la estonteco tio povas esti efika.

Rilate al Esperantaj valoroj:

- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando)** kredas ke bonas pliprecizigi tion. Kvankam gravas neŭtraleco kiel pozicio, ĝi ja estas iu politika pozicio.
 - Pensas ke estus bone havi klaran vojon por la organizo kaze ke grava decido farendas.
 - Povas esti tie invitoj por verkado de grava dokumento, ne nepre verku ĝin ni mem.
- **Lucas (Komitatano A, Francio)** kredas ke la ŝanĝoj sufiĉas, ja ne estas bezono de plua substreko de tiu.

Rilate al videbligi lingvajn temojn:

- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Kiam Erasmus+ estis anoncita ĝi nur aperis en la angla, oni nur faris anoncon tiulingve. Tio estis diskutita en la pola junulara konsilio por ke okazu traduko kaj pridiskuto. Se estas grava temo kiu rilatas al lingvo, estas nia tasko atentigi pri tio.
 - **Charlotte (Prezidanto):**
 - Estas nun diskuto inter TEJO-aktivuloj pri venontaj Erasmus+ alvokoj; ni supozas ke ili denove prioritatigos la anglan version, do diskutendas ĉu ni preparu dokumenton kun kritiko por la alvoko.
 - Ĝi ja estu samtempe disponebla en diversaj lingvoj. Ĉu eble revertumi ion?
 - **Lucas (Komitatano A, Francio):** Plej bone meti "TEJO-valorojn" anstataŭ "Esperanto-valorojn" ĉar la unua ja estas pli bona klarigita.
 - **Charlotte (Prezidanto):** revenas al la teksto. Kiu superrigados la aplikon de tiuj reguloj? Kaj kion ni difinas kiel malavantaĝa?
 - **Lucas (Komitatano A, Francio)** kredas ke troa reguligo estas problemiga.
 - **Charlotte (Prezidanto), Lucas (Komitatano A, Francio)** konsentas pri troa reguligo kaj detaligo, specife en ĉi tiu dokumento.
 - Diskutas pri kiom specifa estu tiu 'malavantaĝita grupo' kaj alvenis al pli bona revortumo de **subpunkto 5.c** en la dokumento: "Helpi plifortigi la pozicion de malavantaĝitaj grupoj, por ke ili havu saman aliron al oportunoj."
 - **Lucas (Komitatano A, Francio)** pensas pri neceso aktualigi retpaĝojn kiel esperanto.net.
 - **Tobiasz (Komitatano A, Pollando)** pensas ke estus bone renovigi retpaĝojn kaj reklami ilin per famaj jutubistoj ekzemple. Kredas ke povus esti bone se TEJO helpus.
 - **Charlotte (Prezidanto)** Ja altvaloras la iranta diskuto pri retpaĝo, sed oni devas reveni al la ĉefa temo pri 'Esperanto'!
 - **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Katalin Kovacz kreas liston de kursoj kaj estus interese diskonigi tiun liston. Atentigas pri edukado.net.
-

Ĉambro 3 Junulara

Gvidas: Carlos (vicprezidanto)

Ĉeestas: Carlos Pesquera (Estrarano); Tomáš Stano (Estrarano); John Magessa (Komitatano A, Tanzanio); Michael Boris (Komitatano B); Alejandro Burgos Escalante (Komitatano A, Hispanio); Shin Mondero (Komitatano Ĉ); Spyros Papadatos (oficisto); Paulína Jalakšová (oficisto); Quentin Auduc (volontulo); Kévin Morel-Fourrier (membro).

- **Michael Boris (Komitatano B)** demandas kiel engaĝi junulojn pri junularaj rajtoj tutmonde.
 - **Alejandro (Komitatano A, Hispanio)** respondas ke helpos trejnado kaj prelegoj ene de nia movado.
- **Paulína (Oficisto)** diras ke ne tiom da homoj en la socio kutime konas la koncepton "junularaj rajtoj". Informi la junularon pri tio estas grava afero.
- **Spyros (Oficisto):** ĝenerale junularaj rajtoj estas prioritato de FOJE.
 - Ni povas poziciigi TEJO-n kiel gravan aktoron en tiu ĉi areo.
 - Gravas trejni niajn membrojn kaj konsciigi ilin por multoblige tion al homoj, kiuj antaŭe ne aŭdis pri ĝi.
- **Michael Boris (Komitatano B)** parolas pri la kategorio Junaj Amikoj de Esperanto dirante ke indas ŝanĝi "retpoŝte", ĉar ne ĉiuj uzas tion nuntempe.
 - **Carlos (Vicprezidanto)** proponas anstataŭigi tion per "rete".
- **Michael Boris (Komitatano B)** indikas ke li ŝatas la punkton 4 kaj demandas el kie ĝi venas.
 - **Spyros (Oficisto)** klarigas ke ĝi jam estis en la antaŭa Realigplano.
- **Hyun Kyu (Komitatano Ĉ)** demandas kiel ni pensas ke TEJO devas agi por defendi junularajn rajtojn.
 - **Michael Boris (Komitatano B)** diras ke la demando juste evidentigas kial ni bezonas tion en la Realigplano kaj petas respondon de **Paulína (Oficisto)**.
 - **Paulína (Oficisto)** klarigas ekzemplojn de defendindaj rajtoj.
- **Carlos (Vicprezidanto)** demandas pri la ideoj de junularo en la diversaj landoj de la partoprenantoj.
 - **Hyun Kyu (Komitatano Ĉ)** respondas pri la situacio en Koreio.
 - **Michael Boris (Komitatano B)** klarigas ke estas tre kultura difino kaj komparas Italujon al aliaj landoj. Li ankaŭ defendas uzi la difinon de la lando kie oni loĝas.
- **Carlos (Vicprezidanto)** petas de **Hyun Kyu** klarigi pri la situacio en sia lando kaj kiel tio influu nian strategian planon.
- Laŭ propono de **Michael Boris (Komitatano B)** oni aldonas al la punkto 6 la punkton 6c:
 - "Ni instigu la Junajn Amikojn de Esperanto iĝi individuaj membroj kaj membroj de landaj kaj fakaj sekcioj de TEJO."
- **Carlos (Vicprezidanto)** klarigas agadon kiu rilatas al la temo en IJK 2018.

- **Michael Boris (Komitatano B)** proponas inkludi la punkton 4c "Krei ligojn kun aliaj organizoj"
- **Hyun Kyu (Komitatano Ĉ)** parolas pri la situacio en Koreio. Tie la junulara movado estas tre malforta pro la premo zorgi pri la profesia vivo kaj li donas ekzemplon pri la religia movado, kie en sia religio estas multaj maljunuloj. Li demandas al **Michael Boris** (Komitatano B) pri la junulara movado en Francio.
 - **Michael Boris (Komitatano B)** respondas ke tie estas bunta organiza junulara movado.
- Estis poste priparolita la situacio de la junularo en la diversaj landoj kaj kontinentoj, kaj aliaj tipoj de agadoj por allogi junulojn.

Ĉambro 4 Organizo

Gvidas: Rogier (Estrarano)

Ĉeestas: Konstanze (Ĝenerala Sekretario), Mung (Kasisto), Michal (Komitatano A, EUROKKA)

- **Rogier (Estrarano):** Kiuj aferoj malbone funkcias en TEJO?
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Enretigo de niaj proceduroj, peza reglamento.
- **Mung (Kasisto):** Estos malpli da financaj rimedoj, rolo de kasisto estas malfacila, unujara mandato maltaŭgas.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Esperantistoj ne scias, kion TEJO faras, vidas nur burokrataĵojn.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Bedaŭrinde homforto malmultas, kaj tiuj dokumentoj estas devigaj.
- **Rogier (Estrarano):** Estas forta divido de scio inter spertuloj kaj averaĝaj aktivuloj, estas malfacile kompreni, kio okazas.
- **Francesco (Kunsidestro):** Defio estas transdono de scio inter estraroj.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Kio pri alternaj estrarmandatoj?
- **Rogier (Estrarano):** Demando pri kiel redakti planon.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Ni aldonu al la dua punkto, ke la reglamento iĝu pli legebla.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Oni informu, por kio utilas la amasa elspezo por eksteraj rilatoj, doni kuntekston.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Oni simple pli aktive informu, kial ni subvencipetas.
- **Rogier (Estrarano):** Ĉu eblus fari pli mallongajn aŭ pli efikajn komitatkunsidojn?
- **Mung (Kasisto):** Oni povas havi laborgrupojn antaŭ KK, por ne diskuti dum plena sesio.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Mankas laborforto.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Se estus pli da aktivuloj, estus malpli da taskoj por ĉiuj.
- **Mung (Kasisto):** Ni devas pli bone uzi haveblan homforton.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Pli da homoj uzu Slack.
- **Rogier (Estrarano):** Laŭ mi la Komitato estu pli malgranda, kaj tiel pli sperta.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Estu pli da decidpovo ĉe estraro, ĉar estraranoj estas pli spertaj.
- **Rogier (Estrarano):** Ekzemple Komitato ne parolu pri Realigplano?
Ni preparolu financojn nun.
- **Mung (Kasisto):** Estos malfacile atingi diversigon de enspezoj, sed ĝi necesos.
- **Rogier (Estrarano):** Kio pri elspezoj?
- **Mung (Kasisto):** Oficistoj nun estas nia ĉefa elspezo, administra subvencio nun ne tute sufiĉas, ni devas investi.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Investi en kion?
- **Mung (Kasisto):** Ni povas investi ankaŭ en aliaj landoj, ne nur en Nederlando
- **Rogier (Estrarano):** Mi konsentas, sed ni ankaŭ rigardu la enspezojn kaj elspezojn. kiel ni kolektu pli da mono el la komunumo? Renkontiĝoj, donacoj, vendajtoj?
- **Mung (Kasisto):**
 - Nia ĉefa elspezo estas oficistoj, ni bezonos ĝeneralan direktoron baldaŭ. Ĉiuj nunaj estas necesaj por la agado de TEJO.
 - Ni povasi ŝpari monon pri oficistoj dungante per landaj sekcioj.
- **Rogier (Estrarano):** Al mi ŝajnas, ke ni povas ŝpari monon havante nur unu fizikan estrarkunsidon jare.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Ni havu malsaman kotizsistemon, la nuna sistemo por A-landoj ne estas tiom justa, oni dividi la aĝojn.
- **Mung (Kasisto):** Mi pensas, ke ni havu pliajn subvencifontojn.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Kion signifas la punkto pri lernigaj rondoj?
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Okazos ekzemple rondo por Ĝeneralaj Sekretarioj, en kiu homoj partoprenas diskutojn, lernas kiel plenumi la rolon kaj pretiĝas por kandidatiĝi al tiu posteno.
- **Rogier (Estrarano):** En multaj okazoj la komisiono bone plenumu tiun rolon, ĉu ne, ni ne havas homforton por ambaŭ.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Nur ke ne ekzistas tio por ĜenSek.
- **Rogier (Estrarano):** Ni povus instigi, ke kandidatoj por la estraro antaŭe aktivu en la koncerna komisiono.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA):** Ĉu jam ekzistas manlibroj kiel la manlibroj por volontuloj?
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Ne, ni nun elspezas tro multan tempon instruante bazan scion al volontuloj kaj aktivuloj.
- **Rogier (Estrarano):** Ni ankoraŭ parolu pri volontuloj, ili faras multon sed ankaŭ bezonas subtenon.

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Malpli se ni starigas volontulejon ĉe ekstera asocio.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Ideale estus unu Estrarano, kiu nur okupiĝas pri volontuloj, aŭ oficisto, kiu duontempe okupiĝas pri ili.
- **Rogier (Estrarano):** Se la estraro dediĉos sufiĉan tempon al la volontuloj, ni multe pli profitos de ilia laboro.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Volontuloj povus kandidatiĝi kun propra projekto, tiel ili estos pli memstaraj.
- **Rogier (Estrarano):** Mi notos, dankon pro viaj multaj ideoj.

8. Laborgrupo pri Buĝeto

La laborgrupo estas libervola kaj daŭras 90 minutojn. Oni pridiskutas la [proponon pri Buĝeto 2021](#) en unu ĉambro.

(Okazas teknika interrompo)

- **Mung (Kasisto):** Estas sama demando de **Miguel** (Komitatano A, Brazilo). La sumo estas tro ideala, por ekvilibrigi financojn, ja bezonas enspezi iel, ekzemple per subvencioj, IJK aŭ amaskolekto. Interrompo
- **Rogier (Estrarano):** Bezonatas paroli kun la Volontulada Agentejo.
- **Mung (Kasisto):** Nur post 6 monatoj post la fino de la kontrakto eblas refari kontrakton kun Said.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Kiam oni havas kunsidon pri volontuloj kun Agentejo?

(Okazas teknika interrompo)

- **Charlotte (Prezidanto):** Ne estis plia demando pri subtenado al loka agado. Ĉu estas pliaj komentoj? Tio stariĝis laŭ ideo de la Komitato.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** ne havas temon por proponi, nur volas atentigi ke multaj Komitatoj ne komprenas kien iras la mono. Kaze de dubo pri lingvaĵo aŭ sigloj, demandu por ke ĉio estu por ĉiu komprenebla.
- **Michael Boris (Komitatano B):** memoras esti aŭdinta ke se Landa Sekcio volus monan helpon de TEJO, tio eblus. Ĉu tiu regulo ankoraŭ validas?
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** supozas ke temas pri agado plus eventoj.
 - Dubinde indus kuraĝigi fizikajn eventojn dum la kronvira pandemio, do estus certe pli da mono por pagi tiujn kostojn kiujn **Michael Boris** menciis.
 - Simple, ni certigas ke la Estraro ne ŝanĝis la decidon de la antaŭaj Estraroj.
- **Mung (Kasisto):** Interrompo.
- **Carlos (Vicprezidanto)** daŭre timas, ke ni ne sukcesos havigi al ni la monon. Por tio, ĉiuj devas strebi. Ne kredas, ke la venonta reta IJK sukcesos kiel la antaŭa kaj unua farita tiufornate.
- **Francesco (Kunsidestro):** Bonvolu okulumi tra la dokumenton kaj vidi ĉu estas dubo.
- **Hans (Komitatano Ĉ):** Oni jam verŝis multe da elektronika inko pri "Partoprenu IJK-n".

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Demandas al la estraro: kiom da gajno restas el IJK en Slovakio?
- Ĉu parto de tiu mono restas por "Partoprenu IJK-n"?
- **Mung (Kasisto):** Oni jam klopodas uzi nur trionon de gajno de IJK por subteni la fonduson. Pro tio ke la kosto altiĝos, ne eblos fari kiel dezirite.
- **Hans (Komitatano Ĉ):** kredas, ke tiuj, kiuj gajnis, havu avantaĝon en la sekva konkurso. Pretas verki rezolucion.
- **Mung (Kasisto):** Du homoj kiuj venas ne de Eŭropo. Ĝis nun oni ne scias ĉu la venonta IJK okazos en Nederlando aŭ ne.
- **Hans (Komitatano Ĉ):** Ĉu eblus sendi la ne-eŭropajn esperantistojn al Ukrainio kaj la aliajn eŭropanojn al la venonta IJK? Substrekas la gravecon partoprenigi homojn en IJK.
- **Mung (Kasisto):** La elektitoj de la konkurso iros al Nederlando se IJK okazos tie.
- **Michael Boris (Komitatano B)**
 - vidas sumon de 1000 eŭroj, ĉu la sumo povus ŝanĝiĝi se ni imagas alian kotizon de la menciita de la listo?
 - Persone preferas ke membroj partoprenu senpage aŭ ke la malsameco kun la nemembroj estu pli alta por instigi homojn partopreni.
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Estis proponita, ke la membroj de TEJO pagu nenion. Triono de la partoprenantoj de la reta IJK estis super la TEJO-aĝo.
 - Ne sencas, ke oni pagu 20 eŭrojn por partopreni eventon en Pasko kaj ke ĝi estu preskaŭ same kosta - ne estas tiel fama aŭ grava evento.
 - Ni nepre havu pli altan profiton, aŭ ne eblos okazigi eventojn.
- **Mung (Kasisto):**
 - Laŭ la propono de **Tyron** (kiu zorgas pri retaj eventoj), la enspezo de la reta IJK povus plejparte kovri la elspezojn de tiu evento.
 - Tamen **Mung (Kasisto)** ŝatus konservi parton de la enspezo.
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Ĝenerale prelegantoj en la eventoj ricevas pagon. La plej kosta parto estas la koncerto, kiu certe estas la plej alloga programero.
 - La reta platformo disponigita de E@I ankaŭ povas esti tre kosta, kaj laŭeble ni devas ne tiom dependi je ili.
- **Snehaĝa (Komisiito pri Scienco):** Estas alia punkto, rilate al subvenciado de retaliro al afrikanoj, oni povas peti unue al la koncernatoj kion ili bezonas kaj nur due por la retkonekto.
- **Mung (Kasisto)** kredas ke la sumo sufiĉas. Kaj atentigas pri la neceso kreskigi la enspezojn, ne la elspezojn.
- **Francesco (Kunsidestro):** Se bezonas, nepre mesaĝu al la komitata listo, ne atendu la lastan minuton.
- **Charlotte (Prezidanto)** volas aldoni ke venis komento pri amasfinancado. Estus bone se iu povas prilabori la kampanjon por ĝia bona strukturigo.
- **Francesco (Kunsidestro):** Bonus allogi patronojn por ke ili ankaŭ kontribuu.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Charlotte (Prezidanto):** Restas 40 min, ĉu iu volas levi ion rilate al la Strategia Plano?
 - **Francesco (Kunsidestro):** Malpliformaligas nun la sesion: ĉiuj rajtas memmalmutiĝi
 - **Albert (A, Filipinoj)** parolas pri sia subgrupo, kie oni preparolis ke la kerna afero estas engaĝado de la landaj agadoj.
 - **Miguel (Komitatano A, Brazilo):** Venis multaj temoj rilate al la buĝeto.
 - La afero levita de **Michael Boris** (Komitatano B), se estas tiu devigo, tio ne influas la buĝeton.
 - Ni devas pripensi la kunordiganton de la volontuloj.
 - **Mung (Kasisto):**
 - Volontuloj ja havas tre gravan influon sur la buĝeto.
 - Ni ne havos **Said** inter junio kaj novembro, eble ni ne bezonos lin dum tiu periodo se ne estas nova volontulo intertempe..
 - **Francesco (Kunsidestro):** Tiu kunordigado povas esti ankaŭ plenumita volontule, ne nepre fare de oficisto.
 - **Charlotte (Prezidanto):** Ĝis nun, ĉio iris glate ĉe la akcepto de novaj volontuloj.
 - **Francesco (Kunsidestro):** En la komitatlisto estos lanĉita la venonta voĉdonado por komitatano Ĉ.
 - **Albert (A, Filipinoj)** invitas patroprenantojn al la Komuna Semiaro, kiu okazos antaŭ la Komitatkunsido.
 - **Francesco (Kunsidestro)** malfermas la 1an sesion je la 15:38 UTC formale.
-

2a sesio de la Komitatkunsido

28an de novembro 2020

12:00 - 15:00 UTC

[Listo de partoprenantoj](#) (vidu "Konfirmo de volontulo pri efektiva partopreno").

La laborgrupoj diskutas la proponojn ricevitajn ĝis la 27-a de novembro, prilaboras ekzistantajn kaj novajn erojn, formulas finan proponon al la Komitato. Je la fino de ĉiu laborgrupo, rezultoj estos senditaj en komitata listo. Partopreno en ĉiu laborgrupo estas libervola kaj malferma al ĉiu individua membro de TEJO.

1. Unua rondo de **laborgrupoj pri Realigplano** (50min + 10-minuta paŭzo)
 - a. Ĉambro 1: Funkciado (**Charlotte**, Prezidanto; **Konstanze**, Ĝenerala Sekretario; **Klára**, Estrarano)
 - b. Ĉambro 2: Aktivula Trejnado kaj Projektoj (**Paulína**, Oficisto; **Tomáš**, Vicprezidanto; **Carlos**, Vicprezidanto)
 - c. Ĉambro 3: Edukado, Scienco, Kulturo (**Karina**, Estrarano)
2. Dua rondo de **laborgrupoj pri Realigplano** (50min + 10-minuta paŭzo)
 - a. Ĉambro 1: Talento, Egaleco (**Klára**, Estrarano)
 - b. Ĉambro 2: Kongresoj (**Carlos**, Vicprezidanto)
 - c. Ĉambro 3: Merkatiko kaj Informado (**Rogier**, Estrarano; **Ariel**, Oficisto; **Charlotte**, Prezidanto)
3. Tria rondo de **laborgrupoj pri Realigplano** (50min + 10-minuta paŭzo)
 - a. Ĉambro 1: Eksteraj Rilatoj (**Charlotte**, Prezidanto); **Konstanze**, Ĝenerala Sekretario; **Spyros**, Oficisto)
 - b. Ĉambro 2: Landa kaj Faka Agado (**Carlos**, Vicprezidanto; **Rogier**, Estrarano; **Klára**, Estrarano)
 - c. Ĉambro 3: Financoj (**Mung**, Kasisto)

1. Unua rondo de laborgrupoj pri Realigplano 50min + 10-minuta paŭzo

Ĉambro 1 Funkciado

Gvidantoj: Charlotte (Prezidanto), Konstanze (Ĝenerala Sekretario), Klára (Estrarano)

Ĉeestas: Rogier (Estrarano), Konstanze (Ĝenerala Sekretario), Klára (Estrarano), Emerson (Meksiko), Soraya, Euleax (Komisiito pri Egaleco), Francesco (Kunsidestro), Charlotte (Prezidanto), Valentin (Protokolas)

Partoprenas:

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** enkondukas la temon kaj donas 5 minutojn por (re)legi la planon.

Verkado de la Jarraporto:

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Kiel oni okazigu la verkadon de la jarraporto: kiel ni faru ĝin pli alloga?
- **Francesco (Kunsidestro):** Ĉu la repagoj de kostoj estu limigita al kontribuo al la raporto?
- **Euleax (Komisiito pri Egaleco):** Ĉu ni faru pli koncizan dokumenton?
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):**
 - Ĉu ni faru anstataŭe voĉan raporton dum malferma kunsido kaj protokolon?
 - La defio estas, ke la dokumento ne taŭgas por kalendara jaro, ĉar tiel du estraroj devas raporti kaj multaj Estraranoj estas lacaj je la fino de sia mandato.
 - Ni fermu la temon, ĉu alia temo?

Ensalutoj dum kunsidoj

- **Klára (Estrarano):** **Charlotte** (Prezidanto) kaj **Klára** (Estrarano) proponis la enkondukon de ensalutoj en kunsidoj, sed ŝajne malmultaj interesiĝas.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Estus bele krei materialon por disvastigi la kutimon - ekzemple kun Ariel por publikigi en tejo.org.
- **Charlotte (Prezidanto):**
 - Dum kunsidaj ensalutoj ni volas scii aferojn rilate al la bonfartoj de la kunsidantoj rilate al kunsido (ĉu estos eblaj intermitoj, ktp).
 - Ni povus fari ekzemplan videon, ekzemple en Enmovade.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** disvastigo de la kutimo ja gravas, ni aldonu eron al la Plano por ne forgesi.

Pri la tempo-dediĉo kaj la realig- kaj strategia planoj

- **Rogier (Estrarano):** Ni pasigis multe da tempo pri la planoj kaj ĝis nun dediĉis relative malmulte da tempo al la fakoj.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Fakte la kunsidoj estas por verkigi homojn, la reala verkado okazas aparte dum la propra tempo.
- **Rogier (Estrarano):** Por kelkaj Estraranoj, la altkvalita verkado iĝas vere malplezura.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Kion vi proponas por la venonta jaro?
- **Rogier (Estrarano):** Peti de ĉiuj estraraj kandidatoj somere malnetan proponon por la venonta Realigplano.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):**
 - Ni kiel Estraranoj ne povas postuli tion, sed tamen rekomendi tion al la Elekta Komisiono (aldonas eron al la plano).
 - Se estas pliaj komentoj, bonvolu aldoni al la dokumento.

Ĉambro 2: Aktivula Trejnado kaj Projektoj

Gvidantoj: Paulína (Oficisto), Tomáš (Estrarano), Carlos (Vicprezidanto)

Ĉeestas: Albert (Komitatano A, Filipinoj), Nicolas (Komitatano B kaj komisiito pri Talento), Michael Boris (Komitatano B), Luana França (Komitatano B), (Mung (Kasisto), David Ruíz (Komitatano A, Katalunio), Niyukuri Gilbert (Komitatano A, Burundo), Renato (protokolas)

- **Tomáš (Vicprezidanto):**
 - Jam ekzistas materialoj, do nun oni devas krei liston. Ŝatus, se la iloj disponigitaj estus vere uzataj.
 - Estos malferma alvoko por trovi novajn trejnistojn, ĉio iros glate. Oni volas havi pli konkretan planon por marto. En Kijivo, ni volas starigi trejnadon por membroj ĝenerale. Trovi trejnistojn por diversaj aranĝoj: retaj kaj ĉeestaj
 - Vere ŝatus pligrandigi la membraron por grandigi la trejnan kapablon.
 - Eksteraj rilatoj: Kredas ke tiuj kiuj faras la kursojn partoprenu en evento en Strasburgo.
 - Genra Egaleco: Ŝatus prilabori ĝin kaj enmeti en la retejon.
 - AMO-Seminarioj: Doni ŝancon al trejnistoj havi pli da sperto. Trovi trejnistojn por diversaj aranĝoj-retaj kaj ĉeestaj.
- **Paulína (Oficisto):**
 - Efektivigo de projektoj por kiuj ni jam ricevis fondusan monon. Marte estos aktiveco pri pluraneco. Estos alia renkontiĝo pri klimato. Ni planas kandidatiĝi ankaŭ al aliaj projektoj, ĉefe interkontinentaj. Estas projekto kun Sudameriko pri daŭripova evoluigo.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Engaĝado de membraj organizoj en la tuta procezo; volas ke la organizoj vere enplektiĝu.
- Estas ankaŭ projektoj al kiuj ni atendas respondon. Tra Konsilio de Eŭropo estas iu pri aktivismo kaj teatro.
- Per Erasmus+, estas iu projekto pri lingvo-politika temo, kaj tre gravas sukcesi en ĝi.
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Oni volas okazigi IJK-n en Afriko denove, kaj Tanzanio kandidatiĝas. Sed tio ŝajne malfacilas. Ideale, venos informoj el aliaj kontinentoj sed praktike ĝenerale nur Erasmus+ helpas (kaj rilataj fondusoj).
 - Aliaj subvencioj estas bonvenaj.
 - Komentas pri la usona sistemo, kiu laŭ li povas esti vojo antaŭen sed eble tre malfacile sukcesebla, ĉar la informoj estas iom kaŝitaj.
- **Tomáš (Vicprezidanto):** Oni devas strebi havi bonan kontakton kun landaj sekcioj kaj ke ili pli aktive helpu: tial, estus interese se ankaŭ la landaj sekcioj helpus pli aktive. Tiel se iu landa asocio volas helpi, ni povas ion kunfari.
- **Mung (Kasisto):** Ni havis multajn projektojn, sed lastatempe ni ne havis multajn. Kio okazas? Kaj kiel solvi tiun problemon?
- **Paulína (Oficisto):** Ni ne havis multe da sukceso kun Erasmus+ sed kun Konsilio de Eŭropo ja ni estis pli sukcesaj. Volas, ke vere estu pli de ĉies kontribuoj.
- **Tomáš (Vicprezidanto):** TEJO ĉiam estis proksime al la akceptota linio, do ĉiam mankis malmulte por ke ni estus elektitaj, do tio povos okazi estontece.
- **Mung (Kasisto) :** Ĉu ni povas peti helpon de firmao?
- **Tomáš (Vicprezidanto):** Tiel povus esti, sed ni bezonus trovi firmaon, kiu simpatias Esperanton. Sed li mem ne tro spertas.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Al la estraro ĉi semajne venis demando. Kiom kostas normale volontulo. Ĉu estas profitdona aŭ ne?
- **Mung (Kasisto) :** Antaŭe ni ricevis 9000 eŭrojn por unu volontulo, sed nun la situacio ŝanĝiĝis. Nun la poŝmono estis malaltigita, kaj estas interkonsento kun UEA pri loĝado.
- **Mung (Kasisto) :** Estas meze profitdona.
- **Paulína (Oficisto):** Multaj informoj ŝanĝadas, inkluzive de la sumo. Do nun informo estas iom nesolida.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Venis propono de staĝo, sed estas limo de kvanto de volontuloj kiuj povas loĝi en la Volontula Domo. Povas esti, ke ni elektos ricevi rektan kandidatiĝon.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Komprenas ke jam antaŭe estis problemo pri la nombro de homoj kiuj loĝis en Volontula Domo.
- **Mung (Kasisto):** Konfirmas ke estas problemo pri la maksimuma nombro de homoj kiuj loĝas tie.
- **Tomáš (Vicprezidanto):** Atentiĝas pri la tempo kaj malfermas por demandoj kaj rimarkoj.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Ĉu estas antaŭvideblaj datoj por la interkontinentaj projektoj kaj trejnadoj?
- **Tomáš (Vicprezidanto):** Dependas de la buĝeto, speciale ĉar interkontinenta projekto estos multekosta.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Paulína (Oficisto):** Vere ŝatus, se la interkontinenta projekto estus pli fokusiĝinta. Volas, ke estu teamo por ke ĝi pli bone kongruu kun eŭropaj reguloj.
- **Michael Boris (Komitatano B):**
 - La subvencipetado ne devas esti vidata kiel alternativo, sed fakte kiel komplemento.
 - Estas multe da kadroj al kiuj ni povus verki proponoj por projektoj kaj havi ian ŝancon sukcesi.
- **Kamil (Komitatano A, Pollando):** Ĉu estas iu projekto kiu aktivigas grandan nombron de organizoj?
- **Tomáš (Vicprezidanto):** Se temas pri atestiloj ekzemple, ni ĉiam provas provizi atestilon kiu detaligas kiu faris kion. Tio helpas ankaŭ en universitatoj ekzemple.
- **Paulína (Oficisto):** Ekzemple, estas Youthpass, ŝablono por fari atestilon kaj pensi kion oni faris dum iu periodo.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Estas faciligado de kunsidoj en la kadro de la trejnoj.
- **Tomáš (Vicprezidanto)** konklude disponigas sin al kontakto okaze de demandoj.

Ĉambro 3: Edukado, Scienco, Kulturo

Gvidanto: Karina (estrarano)

Ĉeestas: Tobiasz (Komitatano A, Pollando), Manuela (Komisiito pri Universitata Agado), Hans (Komitatano Ĉ), Snehaĝa (Komisiito pri Scienco):

Ligiloj al la Telegram-grupoj pri la pridiskutataj temoj:

- **Edukado:** <https://t.me/tejoedukado>
- **Kulturo:** <https://t.me/niakulturo>
- **Scienco:** https://t.me/joinchat/IEe6LRv9Rs_U3Uxe74hQtg

Enkonduko pri la celoj de Edukado, Scienco, Kulturo. Oni tralegas la diversajn erojn de la planero.

Edukado:

- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** ŝatus, se oni pli disvastigas informojn, iniciatojn, projektojn ktp.
- **Karina (Estrarano):** jam faris kelkfoje per videoj, sed ne scias ĉu ĝi bone funkcias. Do indus havi pli formalan manieron por fari tion.
- **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado):** konsentas kun pli da disvastigo de informoj pri la projekto.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Hans (Komitatano Ĉ):** ĉu vi planas labori kun landaj sekcioj? Ni povas helpi ilin, ekzemple per lingvohelpado.

Scienco:

- **Karina (Estrarano):** Tre bona surprizo pri tiu grupo: aktivuloj estas entuziasmaj kaj jam estas 2 videoj pri la grupo. Plejparto de aktivuloj en la grupo ne estas en homa scienco.
- **Snehaĝa (Komisiito pri Scienco)** proponas aldoni la ligilon de la dua video de scienco en la sukcesindikiloj de la Realigplano.

Kulturo:

- **Hans (Komitatano Ĉ):** Ĉiumonata legorondo okazas per Zoom; vi povas aliĝi [tie](#).
- **Karina (Estrarano):** mi partoprenis la legorondon kaj ĝi estas tre interesa, ni vere parolas pri la libroj, do mi invitas vin aliĝi!

Universitata Agado:

- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Kiu estas la diferenco inter la komisiono pri Universitata Agado (UA) kaj la komisiono pri Scienco? Li pensas ke ne klaras kaj povas okazi ke aferoj duobliĝas.
- **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado):** Kelkaj fakoj kiel Historio estas malfacile klasifikeblaj kiel scienco.
- **Snehaĝa (Komisiito pri Scienco):** Scienco kiel grupo pli temas pri "mi volas trovi homojn por paroli kaj labori pri scienco". Universitata Agado estas pli kiel grupo por helpi grupojn de universitatoj.
- **Karina (Estrarano):** Estas kelkaj specifaj celoj sed la du grupoj povas labori kune.

2. Dua rondo de laborgrupoj pri Realigplano 50min + 10-minuta paŭzo

Ĉambro 1 Talento, Egaleco

Gvidas: Klára (Estrarano)

Ĉeestas: Valentin (protokolas), Euleax (Komisiito pri Egaleco), Soraya (Komisiito pri Alireblo), Lucas (Komitatano A, Francio), David (Komitatano A, Katalunio/komisiito pri Liberen), Manuela (Komisiito pri Universitata Agado), Briac (Komisiito pri Adoleska Agado), Luana França (Komitatano B)

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Klára (Estrarano)** (post ensaluto) donas kelkajn minutojn por tralegi la realigplanan parton pri Egaleco.
- **Euleax (Komisiito pri Egaleco)**: Mankas kiel ero la pritakso de la celo "krei trejnadojn", eble pro tio ke la limdato de la celo estas aŭgusto finmandate, do ne estas tempo tuj pritaksi ĝin.
- **Klára (Estrarano)**:
 - Jes, limdato estas aŭgusto ĉar estas tasko por la tuta mandatperiodo.
 - Aldonas al la celo "transdono al sekvonta estrarano" la precizigon, memori la sekvontan Estraron pri tio, ke oni pritaksu ĉi tiun aŭgustan celon.
- **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado)**: Kion oni celas per "aktiva ano" de la laborgrupo?
[diskuto pri la temo]
- **Klára (Estrarano)**:
 - Aktiveco estas subjektiva afero, sed estas tasko de komisiito taksi la aktivecon de anoj kaj interveni je malaktiveco.
 - Ni aldonu tiun taskon al la gvidlinio por komisiitoj.
- **Luana (Komitatano B)**: Ĉu estas plano por estigi egalecon ene de la adoleska agado?
- **Briac (Komisiito pri Adoleska Agado)**: Ĝis nun plejparte novaj adoleskantaj esperantistoj ja estas viroj. Ni ankoraŭ ne pensis pri tio.
- **Klára (Estrarano)**:
 - Estas longdaŭra problemo, ke estas iom pli da viroj ol inoj en la movado.
 - Estus bone krei pli da ligoj inter la laborgrupoj de TEJO, ĉi-kaze inter adoleska agado kaj genra egaleco, por helpi unu la alian.
- **Euleax (Komisiito pri Egaleco)**: Dum IJK okazis programero pri feminismo. Estas pozitive, ke tiuj aferoj estas nun pli ofte preparolataj.
- **Klára (Estrarano)**: Ni aldonu en la Realigplanon tiun plifortigon de kunlaboro inter la branĉoj, kiel celon: kiuj estus la limdatoj kaj indikiloj?
- **Euleax (Komisiito pri Egaleco)**: Ĉu indus krei grupon por pli efike komuniki inter subbranĉoj?
- **Klára (Estrarano)**:
 - Komparas tion al sia sperto en Extinction Rebellion, en kiu ĉiuj grupoj havas plurajn respondeculojn (interna kunordigado, bonvenigo de novuloj, sekretario kaj reprezentanto alekstere): la rolo de reprezentanto povus esti utila.
 - Aldonas en la plano, ke ĉiu laborgrupo havu reprezentanton, kiu komuniku kaj kunordigu kun la aliaj branĉoj.
- **Manuela (Komisiito pri Universitata Agado)**:
 - Pri projektoj kaj genra egaleco - kiam ŝi estis volontulo de TEJO, ŝi klopodis aktivi en sudamerika projekto pro peto de iama Estrarano sed mankis profesia subteno el TEJO - verŝajne pro tio, ke la atento de la oficistoj estis pri la eŭropaj projektoj.
 - Kion ni faru, por konservi la elanon ĉe sudamerikaj aktivuloj ?

Ĉambro 2 Kongresoj

Gvidas: Carlos (vicprezidanto)

Ĉeestas: Mung (Kasisto), Karina (Estrarano), Luana Mello, Paulina (Oficisto), Allan Argollo, Miguel (Komitatano A, Brazilo), Heeyeon (Komitatano A, Koreio), Francesco (Kunsidestro), Kamil (Komitatano A, Pollando), Tomáš (Vicprezidanto), Renato (protokolas)

La komisiono ne nur realigu IJK-n sed ankaŭ estu spaco por ke ĝi realigu aliajn eventojn. Kompreneble realigo de tiuj estas malhelpita de la pandemio. Ankoraŭ ne klaras ĉu Nederlando gastigos IJK-n en 2022.

- **Karina (Estrarano)** sugestis ke **Carlos** (Vicprezidanto) kunvididu sian ekranon por ke ni pli facile sekvu liajn konsiderojn.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Ĉu iu el TEJO superrigadas la organizadon en Kijivo.
- **Carlos (Vicprezidanto):** La lokaj organizantoj jam disponigis aliĝilon, prizorgas la retpaĝon kaj aliajn aferojn. Sed li ja helpas pri kelkaj aferoj, ekzemple, konsilas ĉe iu speciala konsilio kaj kunlaboras kun speciala konsilio.

Diskuto pri vojaĝigo de homoj al la renkontiĝo.

- **Karina (Estrarano):** Rilate al celo de organizado de eventoj, en la temo helpo pri lernado de Esperanto, ni ne scias precize kiel fari tion. Ĉu vi mem kontaktos la landajn sekciojn?
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Tio estus farota de **Robert**, kiu demisiis, do nun ni devas reorganiziĝi por tion fari.
 - Ni povas ankaŭ trovi taŭgajn landajn asociojn kiuj kapablas bone helpi.
- **Karina (Estrarano)** komprenas la situacion de Carlos kaj kredas ke Edukado sin tenas same.
- **Kamil (Komitatano A, Pollando)** pensas, ke estus bone provi jam januare organizi retan semajnfinan testadon, por ke ni provu ankaŭ aliajn platformojn (ne nur Zoom aŭ tiun de E@I) kaj trovu la gravajn erojn kaj erarojn, kiujn ni volos eviti en la estonteco.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Ekzistas tiu platformo Hoping sed ankoraŭ ni ne bone scias pri ĝi. Povas esti, ke ni bezonos la helpon de E@I.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Do eble kolekti ĉion kio estas en la Realigplano por meti en ununuran lokon? Fari iujn dokumentojn kun rekomendoj. Fari dosieron kie estas la ĉefa ideo pri tio, kion pensas la estraro rilate la realigadon de IJK.
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Pli gravas havi iun spacon kie aferoj estas kune. La interkonsento kun la ejo estas bona; ni ne perdos monon kaze ke la renkontiĝo ne okazos. Nur estas perdo da tempo rilate al la organizado.
 - La situacio de Ukrainio estas speciala, ĉar ĉiu lando havas siajn proprajn regulojn.
 - Persone vidas TEJO-n kiel reton de homoj. Se estas evento, la landaj asocioj nepre sciigu TEJO-n por ke ĝi povu iel helpi kaj disvastigi pri ĝia okazo.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Invitas homojn aktivigi.
- Invitas Heeyeon (Komitatano A, Koreio) paroli pri sia sperto rilate al IJK.
- **Heeyeon (Komitatano A, Koreio):**
 - Nun estas la Komuna Seminario, ankoraŭ ni ne vere diskutis la temon. Ni ne estas nepre pozitivaj pri retaj eventoj, kiel la Komuna Seminario.
 - Ni ĝis nun ne havas planon kandidatiĝi al la venontaj IJK-oj, sed tio ja povas ŝanĝiĝi.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Ĉu estas io kio mankas en la Realigplano?
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** Ĉu eble aldoni "Partoprenu IJK-n" tien?
- **Carlos (Vicprezidanto)** pensos pri aldoni linion rilate al tio, parolos kun la Komitato.
- **Mung (Kasisto):** Espereble ni povas vidi unu la alian en Ukrainio, kaj tio helpas la financon.
- **Francesco (Kunsidestro):** Kiel oni povas aperigi tion en gazetaro kaj disvastigi ĝin al la ĝenerala publiko?
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Estis iu prezento antaŭe, kaj tio estis preteksto por sendi tion al gazetaro. La organizantoj jam sendis eĉ al El País, kiu estas granda ĵurnalo. Do, oni bezonas pretekston, ĉar en somero ĝenerale la gazetaro bezonas temojn.
 - La kongresoj bezonas multon por sukcesi, ĉar grava parto de la evento estas renkonti homojn kun kiuj oni amike rilatas. Ju pli multe da homoj partoprenas, des pli da ŝancoj ni havas atingi ĵurnaliston.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):** TEJO povas esti reprezentita kiel nederlanda organizaĵo, do kiel parto de Eŭropa Unio, do tio povas tikligi la aferon.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Ni strebas esti neŭtralaj, kompreneble aferoj de homaj rajtoj estas iom neeviteblaj sed kiel eble plej multe ni neŭtrale nin prezentu. Invitas la landajn asociojn fari samon.
- **Mung (Kasisto):** La gajninto estos anoncita en marto.
- **Francesco (Kunsidestro):** Moviĝas al alia ĉambro.

La subĉambro finiĝis je la 13:45 UTC.

Ĉambro 3 Merkatiko kaj Informado

Gvidas: Rogier (Estrarano)

Ĉeestas: Albert (Komitatano A, Filipinoj), Alejandro (Komitatano A, Hispanio), Hiro (Japanio), Emerson (Meksiko), Michael Boris (Komitatano B), Hans (Komitatano Ĉ), Snehaĝa (Komitatano Ĉ), Zhao (Komitatano Ĉ), Konstanze (Estrarano), Charlotte (Prezidanto), Quentin (Volontulo/Protokolanto)

Rogier tralegas la eron de la Realigplano pri merkatico kaj informado.

Planita agado: "Varbkampanjo pri Junaj Amikoj":

Sukcesindikiloj: "Bone videbla kampanjo en sociaj komunikiloj de TEJO, per propra retpaĝo, raportadi pri rezultaj nombroj."

- **Michael Boris (Komitatano B):** Ĉu indus aldoni pli konkretajn detalojn pri kiel ni varbos Junajn Amikojn.
- **Hans (Komitatano Ĉ):** Kontentas sed eble la plano ne estas sufiĉe konkreta. Oni devus havi planon por purigi la bildon de TEJO ĉe la maljunaj esperantistoj.
- **Charlotte (Prezidanto):** komentas, ke informado celas homojn, kiuj scias, ke ili volas informojn; merkatico celas homojn, kiuj ne scias ke ili volas ion scii.
- **Albert (A, Filipinoj):** havas tri rimarkojn:
 - Mankas varbadplano por la reta evento en aprilo.
 - Proponas publikigi iun albumon kiu montrus landajn sekciojn.
 - Proponas komunan kalendaron inter TEJO kaj landaj kaj fakaj sekcioj.
- **Rogier (Estrarano):** Jam ekzistas kalendaro inter oficistoj, estraranoj kaj volontuloj, do ni povos paroli pri tio dum venonta retEsKu.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Oni povus eĉ pli bone varbi por patronoj dum UK.
- **Hans (Komitatano Ĉ)** konsentas kun **Michael Boris**. Oni eĉ povus doni insignon al patronoj por iliaj nomŝildoj dum kongresoj.
- **Michael Boris (Komitatano B):** Ne forgesu ke patronoj havas la samajn rajtojn kiel membroj (krom voĉdoni, ofici, ktp). Indas pli bone instigi homojn al patroniĝo.
- **Hans (Komitatano Ĉ)** rekomendas se eble, ke ni ne petu fiksitan kvanton da mono por patroniĝo. La kotizo povas resti pli-malpli 100 eŭroj, sed ni ne diru nur "100 eŭroj" sed "se vi preterpasas tiun sojlon, vi estas konsiderata patrono de TEJO."
- **Ariel (Oficisto):** Estos serio da intervjuoj de patronoj. Ni ankaŭ povus fari ni mem videon de prezento de landaj sekcioj.
- **Albert (Komitatano A, Filipinoj):** Povas esti malfacile registri sin mem, sed se sekcioj nur devas respondi al formularo kaj poste TEJO faras videon aŭ grafikajon kun la informoj, ne estus problemoj.

3. Tria rondo de laborgrupoj pri Realigplano 50min + 10-minuta paŭzo

Ĉambro 1 Eksteraj Rilatoj

Gvidas: Rogier (Estrarano)

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

Ĉeestas: Hans (Komitatano Ĉ), Valentin (protokolas), Michael Boris (Komitatano B), Paulína (Oficisto), Lucas (Komitatano A, Francio), Charlotte (Prezidanto), Alejandro (Komitatano A, Hispanio), Michael (Komitatano A, Germanio), Wenqi (Venki, Komitatano Ĉ), Luana (Komitatano B), Spyros (Oficisto), Konstanze (Ĝenerala Sekretario)

Charlotte (Prezidanto) gvidas la kunsidon kaj priskribas la diversajn punktojn de la plano.

1. Situacio kun IKRJO (Internacia Kunordiga Renkontiĝo de Junularaj Organizoj):

- **Charlotte (Prezidanto):** priskribas la lastajn novaĵojn pri IKRJO en kiu **Joop** kaj **Spyros** (Oficisto) tre aktivas. **Joop** aparte okupiĝas pri la reaktivigo de ĝia retejo.

2. Aktive okupiĝi ene de FoJE kaj pliigi la ĉeeston de TEJO (Forumo Junulara Eŭropo):

- **Paulína (Oficisto):** Priskribas la situacion en FoJE, al kies estraro ŝi estis ĵus elektita.

3. Regula klerigado pri politikaj temoj en retaj eventoj:

- **Hans (Komitatano Ĉ):** Konsterniĝas pri tio, ke TEJO foje prezentas kelkajn temojn kiel oficialajn malgraŭ neniu politiko aprobata de la Komitato tiukampe.

4. Partopreno kaj disvastigo de UNITED-kampanjoj kaj konferencoj:

- **Michael (Komitatano A, komisiito pri UNITED)** partoprenis kampanjon kontraŭ faŝismo kaj reprezentis GEJ en la lasta konferenco de UNITED.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Kiam okazos la sekva UNITED-konferenco?
- **Michael (Komitatano A, komisiito pri UNITED):** Ni ankoraŭ ne scias, sed supozeble ĝi okazos rete komence de 2021.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Indas instigi landajn sekciojn partopreni en UNITED-eventoj.

5. Sekvi malfermajn alvokojn de FoJE (Forumo Junulara Eŭropa) kaj engaĝi niajn membrojn en ilin:

- **Spyros (Oficisto):** Pri la Junulara UE-Konferenco ([UE Youth Conference](#)) **Konstanze** (Ĝenerala Sekretario) partoprenis en la lasta konferenco.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):**
 - Okazis komence de oktobro; havis profitdonan konversacion kun politikistoj.
 - Indas partopreni en tiuj retaj okazaĵoj ĉar la partoprenantoj estas malmultaj.
- **Paulína (Oficisto)** faris multajn amendojn nome de TEJO dum la Ĝenerala Asembleo de FoJE.

6. Partopreno en COMEM (Council of Members) de FoJE:

- **Spyros (Oficisto):** TEJO partoprenos la konferenco de FoJE.

7. Partopreno en YO!Fest 2021:

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** estos en Strasburgo tiutempe, okazigo de la evento ne estas certa pro la pandemio sed ŝi estos surloke kaze de efektiva okazigo.

8. Kontribuo de UNITED-aktivulo al Esperanto-evento:

- **Michael (Komitatano A, komisiito pri UNITED):** Supozeble ni povos denove inviti UNITED-anojn al la venonta IJK: estos pli facile, se ĝi okazos rete.

9. UN Altnivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo:

- **Hans (Komitatano Ĉ):** Estas evento de UN, jam estas datoj por ĉeesta evento sed tute eblas, ke ĝi enretigōs.

10. Partopreni en Ĝenerala Asembleo aŭ/kaj Pacforumo de UNOY:

- **Charlotte (Prezidanto):** Problemo estas, ke **Ana** ne povas okupiĝi pro tio, ke ŝi baldaŭ demisios kiel komisiito.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Ni ja devas aldoni eron pri varbado de komisiitoj por UNOY, KdE kaj IKRYO.
- **Lucas (Komitatano A):** Ŝatus partopreni en eventoj, eble indus aldoni la lokojn de la konferencoj - tio faciligos la partoprenon de aktivuloj loĝantaj apude.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** KER estas unu el tiuj fakoj, kiuj povas profiti de la situacio ĉar oni povas ege pli facile kaj malpli koste sendi aktivulojn.

Ĉambro 2 Landa kaj Faka agado

Gvidas: Carlos (Vicprezidanto), Rogier (Estrarano), Klára (Estrarano)

Ĉeestas: David Ruíz (Komitatano A, Katalunio), Koffitche (Membro), Miguel (Komitatano A, Brazilo), Heeyeon (Komitatano A, Koreio), Tobiasz (Komitatano A, Pollando), Klára (Estrarano), Rogier (Estrarano), Kamil (Komitatano A, Pollando), Hiro (Komitatano A, Japanio), Albert (Komitatano A, Filipinoj), Janett (Komitatano A, Germanio), Luana Mello (Anstataŭanto de Komitatano A, Argentino), Soraya, Nicolas (Komitatano B kaj Komisiito pri Talento), Ariel (Oficisto), Renato (Protokolanto/Volontulo)

- **Rogier (Estrarano):**

- Ĉu ĉiuj scias kio estas Landa kaj Faka Agado?
- Ĉu estas demandoj pri la punktoj ĉe la Realigplano?
- Estis ideo havi sekcion de la semajno, por instigi agadon.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Kion laŭ vi TEJO faru?
- **David (Komitatano A, Katalunio):**
 - Informi landajn kaj fakajn asociojn, por ke ni bone sciu kion TEJO povas fari por ni.
 - Estus bone kontakti ne-junularajn landajn asociojn kaj pli bone interagi kun ili.
- **Tobiasz (Komitatano A, Pollando):**
 - Ideale, ĉiu komitatano estu la preferata homo por kontakti sian landan asocion. Kelkaj el ili simple ne multe aktivas.
 - Kia vi trovas tiun KODEJOn, kia vi juĝas vin? Por havi pli da persona kontakto.
- **Koffitche (Membro):**
 - Pri Landa kaj Faka Agado, komprenas ke TEJO devas havi reprezentanton en ĉiuj landoj de la mondo.
 - Li unue legis pri tio en UEA-paĝo. Opinions ke Faka agado estas malsama ol Landa, do iam devus esti malkunigo de tio.
- **Rogier (Estrarano): Koffitche** (Membro) kaj **Albert** (Komitatano A, Filipinoj) estas kandidatoj, do iliaj paroloj tre gravas.
- **Albert (Komitatano A, Filipinoj):** Eble ne estas saĝe unuavice ilin paroligi ĉar povas esti iom longe.
 - Listigi la planon en du planoj, la unua parto estas tiu, kiu estu plenumita sendepende de lia elekto, kaj la dua parto estas liaj propraj planoj.
 - Informado kaj Merkatiko kolektas kelkajn faktojn, sed ni volas havi aliron al tio. Estas malfacile havi kontakton, do estus bone havi faciligitan kontakton kun TEJO kaj aliaj landaj sekcioj. Krome, ankaŭ ĉiumontaj kunsidoj.
- **Kamil (Komitatano A, Pollando):** Dependas de la situacio. Konas jam kelkon da homoj kiuj agas sialande, sed la plejparto el ili tion ne emas. Kamil volas iom pli bone scii la situacion por ion diri.
- **Janett (Komitatano A, Germanio):** Ne havas kontribuojn.
- **Koffitche (Membro):** Kiam Albert parolis, ne certas ĉu ni devas kontribui kaj doni ideojn al la afero.
 - Afriko estas tre nevidebla kaj kalkulas por eble nur 1% de videbla agado. Estas multaj afrikanoj kiuj agadas en la kontinento, sed ili ne havas elvidon.
 - Kiam parolas pri KODEJO, tio estas parto de landa agado, do ni devas krei aplikojn al kiu oni povas aldoni la okazaĵojn. En Afriko, ja estas agado sed ĝi estas nevidebla. Oni devas doni ilon por ke tiuj junuloj povu membriĝi al TEJO kaj videbliĝi.
- **Rogier (Estrarano):** Kiel bone videbliĝi tion? Ni havas cirkuleron, sed ĝi ne estas vaste legata. Pri la kotizo, oni jam zorgas pri tio.
- **Carlos (Vicprezidanto):**
 - Ni devas konscii ke la kondiĉoj estas malsamaj. Ekzemple, en Afriko, oni ĝenerale lernas per fizika materialo kaj en Eŭropo per reta.
 - Emfazas la internaciecon de la asocio. Ĝi ja estu fleksebla. Oni devas serĉi kiujn homojn kontakti.

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Miguel (Komitatano A, Brazilo):** Esprimas sian optimismon kaj esperas ke pli bona KODEJO estos farata.
- **Hiro (Komitatano A, Japanio):** Ne havas ion aldonendan. Sentas ke KODEJO estas nur statistika afero, kaj ke ne sufiĉas por kompreni la realan situacion iulande. Ekzemple, en Japanio estas iom nova afero, iom modeca, sed ne vere kontribuas al la movado.
- **Carlos (Vicprezidanto):** En KODEJO oni devas meti ankaŭ tion, kion oni bezonas. Li jam konis homon kiu lernis Esperanton pro videoludo. En Japanujo tiu maniero atingi homojn tamen estas pova.
- **Albert (Komitatano A, Filipinoj):**
 - Konsentas kun Hiro, ke KODEJO ne sufiĉas, sed ni ja bezonas datumojn, do ĝi havas sian valoron.
 - Opinions ke devas esti pli da kunsidoj.
 - La cirkuleroj estas nebula en la senco ke la personaj atingoj ne bone distingiĝas disde la asociaj atingoj.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Demokratio ne temas nur pri voĉdonado kaj manifestacioj, temas ankaŭ pri aktiveco. Kodejo estas dosiero por ĉiuj, por ke ĉiuj povu scii kio okazas tie. Ni ankaŭ valorigu homajn kontaktojn, ĉar ni estas homoj.
- **Heeyeon (Komitatano A, Koreio):** Ne havas ideon.
- **Nicolas (Komitatano B kaj Komisiito pri Talento):** Ne havas grandan kontribuon.
- **Koffitche (Membro):** Provas relanĉi la Togolandan Junularan Sekcion.
 - La asocio ankoraŭ ne estas registrata en la ŝtato. Volas varbi membrojn en la junulara sekcio. Ĝi neniam havis membrojn, sed li volas, ke tio okazu. Emis resanigi tiun movadon. Kiel TEJO povas helpi atingi tiun celon?
 - Ekzemple, ne estis loko antaŭe por ke la renkontiĝo okazu. Tiu projekto estis iom zorgata de iu eks-prezidanto, sed nun tio estis iom forgesita. Parolas pri la neceso havi ĉambron por meti posedaĵojn.
- **Rogier (Estrarano):** Tio estas tre specifa celo. Eble Patronoj povas helpi tiukampe. Tion li metas en Realigplanon.
- **Klára (Estrarano):** Eble utilis havi mentoron por novaj landaj sekcioj.
- **Nicolas (Komitatano B kaj Komisiito pri Talento):** Kion fari se la landa sekcio ne estas aktiva? Kiel Komitatano B, kiel li povas kontribui por ties reaktivo?
- **Koffitche (Membro):**
 - Unue en 2018, li proponis al iu gravulo de tiu lando ke estus du landaj asocioj tie, unu por Kinsaŝa, alia por orienta Kongo. Diras ke en Kongolando, la situacio estas kompleksa.
 - Eble diskuti kun iu gravulo por fari "federacion" por la landa. La novaj teknologioj povas ebligi al ili fari kunsidon.
- **Nicolas (Komitatano B kaj Komisiito pri Talento):** Tiun respondeculon li jam multfoje kontaktis, sed ri ne estas multe alirebla kaj respondema.
- **Carlos (Vicprezidanto):** Ne bonas tro dependi je nur unu homo aŭ asociitaj homoj. Starigu eventojn, kiel okazas en iu lando, bierumado ja bonas. Komencu per homoj ne per strukturo.

- **Albert (Komitatano A, Filipinoj):** Per retroŝto oni daŭrigu la verkadon. Pro tempomanko mi nur sendos aparte miajn proponojn al la Realigplano kun kompleta vortumado.

Ĉambro 3 Financoj

Gvidas: Mung (Kasisto)

Ĉeestas: Emerson (Komitatano A, Meksiko), Snehaĝa (Komitatano Ĉ), Tomáŝ (Estrarano), Quentin (Protokolanto/Volontulo)

Mung (Kasisto) tralegas la eron kaj respondas al demandoj.

- Ĉu Financa Komisiono jam ekzistas? Aŭ ĉu ĝi estas planita?
 - **Mung (Kasisto):** Nun ĝi estas nur planita. Ne estas multe da homoj, sed tiu komisiono tre gravas por helpi la kasiston.
- Vi planas kontakti la landajn sekciojn, sed lastfoje Robert plendis ke li ne ricevis respondon. Kiel vi faros?
 - **Mung (Kasisto):** Ni demandos per la Komitatoj A.
- **Emerson (Anstataŭanto por Meksiko):** "pagigos landajn sekciojn surbaze de la datumoj en KODEJO". Ĉu tiuj nombroj estos veraj?
 - **Francesco (Kunsidestro):** Oni devus ŝangi la regulon, por ke membriĝi al landa sekcio estus membriĝi al TEJO.

3a sesio de la Komitatkunsido

29an de novembro 2020

12:00 - 13:30 UTC

[Listo de partoprenantoj](#) (vidu "Konfirmo de volontulo pri efektiva partopreno").

Unu horon antaŭ la komenco de la kunsido la kunsidestro Francesco Maurelli malfermis la Zoom-ĉambron kaj poste, kune kun la CO-voluntuloj, li komencis enirigi la partoprenantojn kaj kontroli iliajn identecojn. La kunsidestro bonvenigas la partoprenantojn.


- **Michael Boris (Komitatano B)** proponas aldoni la tagorderon "Elekto de nova estrarano" komence de la hodiaŭa tagordaro.
- **Rogier (Estrarano)** preferas okazigi retan voĉdonadon kaj ne dumkunsidan elekton.
- **Michael Boris (Komitatano B)** favoras retan diurnan voĉdonadon sed emas profiti nun de la ĉeesto de la kandidatoj por pridiskuti tion, dum maksimume 15 minutojn.
- **Charlotte (Prezidanto)** preferas fari tion fine post la traktado de la Strategia Plano por doni tempon al la kandidatoj por pretiĝi kaj do voĉdoni fine de la sesio.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** preferas voĉdoni dum la kunsido, ĉar la lasta reta voĉdono pri Komitatano Ĉ havis tre malmulte da partoprenantoj.
- **Francesco (Kunsidestro)**: Kiel oni traktu la sindetenojn?
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)**: Ni nur kalkulas neojn kaj jesojn.

Voĉdono: Aldono al la tagordero: "Elekto de nova estrarano komence de la hodiaŭa sesio"

- JES 17 - 59%
- NE 4 - 14%
- SINDETENO 8 - 28%

→ propono **APROBITA**

- **Francesco (Kunsidestro)** startigas diskuton pri la raporto sendita de la Elekta Komisiono.
- **Michael Boris (Komitatano B)** resumas:
 - Oni sondis la emojn de la eblaj kandidatoj kaj oni ricevis la kandidatiĝojn de **Koffitche Koufionou** kaj de **Albert Stalin Garrido**.
 - La Elekta Komisiono rekomendas **Albert** (Komitatano A, Filipinoj) kiel elektotan estraranon pri Landa kaj Faka Agado.
- **Charlotte (Prezidanto)** proponas ke la kandidatoj sin prezentu.
- Nur **Albert (Komitatano A, Filipinoj)** sukcesas mallonge sin prezenti, ĉar **Koffitche** havas teknikajn problemojn.



- **Albert (Komitatano A, Filipinoj)** memprezentas:
 - Li estas nuntempe Komitatano A por Filipinoj, vickomisiito pri Landa kaj Faka Agado en Azio kaj prezidanto de Filipina Junulara Organizo (FEJ).
 - Lia ĉefa prioritato estas enplektiĝo de aktivuloj en la movado kaj pli bona interŝanĝo de ideoj kaj spertoj.
- **Rogier (Estrarano)** demandas al **Albert** ĉu li havos sufiĉe da tempo por la estrarana laboro, pro ties multa engaĝiĝo en FEJ.
- **Albert (Komitatano A, Filipinoj)** konsentas ke tio estos defio kaj pro tio li prokrastis sian kandidatiĝon. Li malferme komunikis antaŭe kun la FEJ-anoj kaj klarigis ke li ja povus ekvilibri sian tempon inter FEJ kaj TEJO.
- **Francesco (Kunsidestro)**: Ne estas aliaj demandoj, proponas daŭrigi kun la sekvaj tagorderoj kaj reveni al tiu ĉi kiam Koffitche povos sin prezenti.

1. Amendoj al la Buĝeto

- **Mung (Kasisto)** unue volas klarigi, ke estis ŝanĝo en buĝeto pro ŝanĝo de la nombro de volontuloj akcepteblaj. Ŝi strebas ekvilibrigi la buĝeton, parte per monkolekta kampanjo.

Ne ekzistas kromaj amendoj al la buĝeto aŭ aliaj komentoj.

Voĉdono: Ĉu la Komitato akceptas la proponitan buĝeton?

- Jes; 28 voĉoj - 93%
- Ne; 0 voĉoj - 0%
- Sindetenoj: 2 voĉoj - 7%

→ propono **APROBITA**



2. Amendoj al la Realigplano

La respondeculoj pri la subfakoj de la antaŭa sesio raportas pri la ĉefaj progresoj de sia grupo.

a. Raporto de la laborgrupoj pri la amendoj

- Funkciado
 - **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** raportas, ke aperis nur etaj lingvaj ŝanĝoj en la sekcio Funkciado, sed oni aldonis detalojn pri Jarraporto.
- Financoj
 - **Mung (Kasisto)** prezentis la Realigplanon en la grupo kaj respondis la demandojn de la Komitatanoj, ne aldoniĝis novaj eroj al la plano. **Mung** (Kasisto) krome strebas trovi novajn subvenciojn kaj provas malaltigi la kostojn per renegocado de la kostoj de volontuloj kaj oficistoj.
- Aktivula trejnado & Projektoj

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Tomáš (Vicprezidanto):** Ne estis amendoj, simple aldonis kelkajn erojn al necertaĵoj.
- Kongresoj
 - **Carlos (Vicprezidanto):** Dum la debato oni aldonis eron pri la konkurso "Partoprenu IJK-n".
- Edukado, Scienco, Kulturo
 - **Karina (Estrarano):** La grupo havas 4 komiisitojn. Estis diskuto sed ne estis amendoj.
- Eksteraj rilatoj
 - **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Estis simpla detaligo de sigloj kaj simplaj ŝanĝoj.
- Landa kaj Faka Agado
 - **Rogier (Estrarano) & Charlotte (Prezidanto):** Venis amaso da komentoj dum la laborgrupo. Ankoraŭ bezonas iom da tempo por finorganizi ĉiujn kontribuojn.
- Informado
 - **Rogier (Estrarano):** Venis 2 amendoj dum la laborgrupo kaj ricevis vastan subtenon.
- Junaj Amikoj de Esperanto
 - **Carlos (Vicprezidanto):** Ankoraŭ ne venis amendoj pri tio.
- Patronoj
 - **Klára (Estrarano):** Ne estis laborgrupo pri tio.
- Talentaro
 - **Klára (Estrarano):** La vorto "Talentaro" enhavas talenton, adoleskan agadon kaj egalecon. Oni aldonis ĝeneralan eron supre, por la venonta estrarano kaj por atentigi pri aŭgustaj celoj. Oni aldonis ankaŭ ke komisiitoj estu respondecaj pri kontrolado de la aktivado de aktivuloj.
 - **Michael Boris (Komitatano B)** aldonas, ke la patronoj estis ankaŭ preparolataj en la grupo pri informado kaj merkotiko.
 - **Rogier (Estrarano):** Estis 2 amendoj, interalie ke patronoj povas pagi pli ol nur la bazan aliĝkoston.
 - **Francesco (Kunsidestro):** Ni pensu pri kiel allogi la ĵus elirintajn TEJO-membrojn kiel patronojn. Ni nun rigardu la voĉdonendajn komentojn.
 - **Charlotte (Prezidanto)** atentigas la Komitaton, ke ni ne aldonu tro multe da eroj nun spontante proponitaj en la Realigplano, ĉar ekzistas la risko ke ili ne estos plenumitaj pro manko da pripensoj kaj planado.
 - **Francesco (Kunsidestro):** Efektive la realigo de la plano estas ankaŭ tasko de la Komitatanoj, proponi ideon egalas al pretigi sin por kunlabori pri tiuj.

b. Proponoj de amendoj

- Amendo pri "Sekcio de la semajno":

KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Albert (Komitatano A, Filipinoj)** proponas ke Landa kaj Faka Agado kune kun Merkatiko de Ariel publikigu ĉiusemajne bildon pri la lastaj atingoj de la landaj asocioj por pli bone videbligi ilin.
- **Propono:** La Komitato amendas la Realigplanon aldonante la eron "Sekcio de la semajno" kun dato "ekde januaro" kaj priskribo "Ĉiusemajne atento en internaj sociaj komunikiloj pri iu landa aŭ faka sekcio" en la sekcio "Informado". → **APROBITA**, vidu la voĉdonojn sube.
- Amendo pri "Disvastigo de la kategorio" (Junaj Amikoj de Esperanto):
 - **Michael Boris (Komitatano B):** Gravas ke la celoj estu realismaj kaj ambiciaj; proponas ŝanĝi la celitan numeron de novaj anoj en tiu kategorioj de cent al mil.
 - **Propono:** La Komitato amendas la Realigplanon aldonante "1000" anstataŭ "100" en la sekcio "Junaj Amikoj de Esperanto"
- **NEAPROBITA**, vidu la voĉdonojn sube.
- Amendo pri "Elekto de Komitatano C"
 - **Rogier (Estrarano)** klarigas ke kiam AKSO estos preta (espereble en la venontaj monatoj) oni povos pli facile mastrumi la kategorion Junaj Amikoj de Esperanto, por poste atingi finfine la elekton de Komitatano C.
 - **Michael Boris (Komitatano B)** proponas majon kiel taŭgan eblan celon por tion efektiviĝi.
 - **Rogier (Estrarano)** kredas ke por la venonta Realigplano ĝi estos preta.
 - **Francesco (Kunsidestro):** Probable, decembre ĝi jam estos disponebla por eta grupo kaj januare espereble jam betatestebla kun pli granda nombro de testantoj.
 - **Francesco (Kunsidestro):** Ĉu estas plej prudente diskuti pri la elekto de Komitatano C post la publikigo de AKSO?
 - **Michael Boris (Komitatano B):** Ŝatus aldoni datojn pri la ekhavigeblo de AKSO.
 - **Francesco (Kunsidestro):** Aldonas kiel informadikisto, ke multaj taskoj alvenas fine de la programado kaj prokrastos la lanĉon de AKSO.
 - **Propono:** La Komitato amendas la Realigplanon aldonante "Elekto de Komitatano C" kun dato "majo" kaj priskribo "Komenco de la voĉdonprocedo" en la sekcio "Junaj Amikoj de Esperanto"
- **APROBITA**, vidu la voĉdonojn sube.
- Amendo pri "Partneriĝo en Eŭropa-Azia projekto"
 - **Michael Boris (Komitatano B):** Kredas, ke pro tio ke TEJO estas tutmonda estas strebinde ke ni havu pli da internaciaj projektoj. Volas, ke TEJO aktive strebu por projekto de partnerado inter Eŭropo kaj Azio.
 - **Carlos (Vicprezidanto):** Komentas, ke la afero ne estas tre realisma ĉar mankas hom- kaj financrimedoj.
 - **Michael Boris (Komitatano B):** Rilate al financoj: veras ke la unua interkontinenta projekto estis iom malfrua, sed la verkado mem ne estas tiom kosta, la ambicia

situacio de IJK povas esti iom kosta. Eventuala IJK en Eŭropo ne alfrontos tiom da malfacilaĵoj pro tio ke en Eŭropo la ĝenerala ekonomia kaj socia medio estas pli favora.

- **Mung (Kasisto):** Volas aldoni, ke por dua interkontinenta projekto, TEJO devos pagi grandan elcenton de la tutaj kostoj kaj tio grande pezos sur la nuna situacio de TEJO.
- **Francesco (Kunsidestro):** Estas diversaj manieroj fari ke ĝi ne estu deficitiga, estas multaj manieroj pli bone enspezi. Multaj homoj laboris dum la afrika IJK, kaj ili nun spertas. Indus kontakti ilin.
- **Propono:** La Komitato amendas la Realigplanon aldonante "TEJO instigu la kreadon de KA2-kapablokonstruadan projekton, serĉu kunordiganton kaj estu partnero en ĝi." anstataŭ "Kaze ke ĝi estas proponita al TEJO de aliaj asocioj, TEJO estus partnero en ĝi" en la sekcio "Projektoj"
- **APROBITA**, vidu la voĉdonojn sube.
- Amendo pri "Kandidatiĝo por la Aprila limdato de Erasmus+"
 - **Michael Boris (Komitatano B):** Se estos limdato ekzemple en aprilo, TEJO povas rekandidatiĝi por partnerado kun Erasmus+ denove, se estas poste, ni povos pli bone prilabori niajn proponojn. Do, ŝajne estus pli bone prezenti nian kandidatiĝon poste, ĉar tiam ni povas prezenti pli bonan kaj ampleksan planon.
 - **Propono:** La Komitato amendas la Realigplanon aldonante "TEJO rekandidatiĝas, alikadre kaze de sukceso en oktobro." anstataŭ "Kaze de nesukceso en oktobro, TEJO rekandidatiĝas." en la sekcio "Projektoj".
- **APROBITA**, vidu la voĉdonojn sube.

3. Voĉdonoj pri la Realigplano

Amendo 1: La Komitato amendas la Realigplanon aldonante la eron "Sekcio de la semajno" kun dato "ekde januaro" kaj priskribo "Ĉiusemajne atento en internaj sociaj komunikiloj pri iu landa aŭ faka sekcio" en la sekcio "Informado".

- Jes: 21 - 65%
- Ne: 6 - 19%
- Sindetenoj: 4 - 13%

→ **APROBITA**

Amendo 2: La Komitato amendas la realigplanon aldonante "1000" anstataŭ "100" en la sekcio "Junaj Amikoj de Esperanto".

- Jes: 11 - 35%
- Ne 11 - 35%
- Sindeteno: 9 - 29%



KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

→ Tiukaze la regularo priskribas ke la kunsidestro decidu: **Francesco (Kunsidestro) decidis ne aprobi la proponon.**

Amendo 3: La Komitato amendas la realigplanon aldonante "Elekto de Komitatano C" kun dato "majo" kaj priskribo "Komenco de la voĉdonprocedo" en la sekcio "Junaj Amikoj de Esperanto".

- Jes: 20 - 65%
- Ne: 3 - 10%
- Sindeteno: 8 - 26%

→ **APROBITA**

Amendo 4: La Komitato amendas la realigplanon aldonante "TEJO instigu la kreadon de KA2-kapablokonstruadan projekton, serĉu kunordiganton kaj estu partnero en ĝi." anstataŭ "Kaze ke ĝi estas proponita al TEJO de aliaj asocioj, TEJO estus partnero en ĝi" en la sekcio "Projektoj".


- Jes: 21
- Ne: 3
- Sindeteno: 7

→ **APROBITA**

Amendo 5: La Komitato amendas la realigplanon aldonante "TEJO rekandidatiĝas, alikadre kaze de sukceso en oktobro." anstataŭ "Kaze de nesukceso en oktobro, TEJO rekandidatiĝas." en la sekcio "Projektoj".

- Jes: 24 - 77%
- Ne: 3 - 10%
- Sindeteno: 4 - 13%

→ **APROBITA**



- **Francesco (Kunsidestro):** Post la traktado de tiu ĉi punkto, proponas reveni nun al la kandidatiĝo de Koffitche.
- **Koffitche (Membro)** sin prezentas:
 - Lastjare li estis en la estraro. Tio ne estis tiom fruktdona, sed li tamen povis uzi la eblon por antaŭenigi la afrikan movadon.
 - Estas laŭ li granda problemo pri komunikado kaj pro tio volas informilon por diskonigi la agadon de la asocioj.
 - Li precipe vidas, ke estas granda manko de reprezentado de la Afrika Agado, precipe fare de la junularoj, kiujn li juĝas viglaj kaj aktivaj.
- **Francesco (Kunsidestro):** Nun venas tempo por diskuti kaj starigi demandojn.
- **Charlotte (Prezidanto):** Kion vi lernis de sia pasinta estrara mandato kaj kiel vi uzos tiun sperton?

- **Koffitche (Membro):** Dum la pasinta mandato, li multe lernis - precipe pri TEJO kaj ĝia funkciado. Pri tio kion li farus pli bone en nova mandato, li intencas videbligi landajn sekciojn.
- **Kamil (Komitatano A, Pollando):** Ĉu vi sentas vin pli kompetenta ol la alia kandidato?
- **Koffitche (Membro):** Taksas lian kontraŭulon tre kompetenta, sed taksas sian propran konon de TEJO pli profunda.
- **Francesco (Kunsidestro):** Ni povos reveni al tiu punkto fine de la 4a sesio se estas tempo.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario):** Lanĉas la voĉdonadon pri la nova estraro en Centra Reto.

La sesio ne estas plilongigita. Oni pritraktos la restantan tagorderon dum la 4a sesio, kiu komenciĝos post duonhora paŭzo.

4a sesio de la Komitatkunsido

29an de novembro 2020

14:00 - 15:30 UTC

[Listo de partoprenantoj](#) (vidu "Konfirmo de volontulo pri efektiva partopreno").

- **Francesco (Kunsidestro)** rebonvenigas la partoprenantojn kaj lanĉas voĉdonon pri la Realigplano

Voĉdono: "La Komitato aprobas la proponitan Realigplanon por la mandato 2020-2021."

- Jes: 29 - 97%
- Ne: 0 - 0%
- Sindeteno: 1 - 3%

→ **APROBITA**



1. Amendoj al la Strategia Plano

- **Charlotte (Prezidanto)** rapide prezentas la Strategian Planon.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** komentas, ke ne vere havas sencon voĉdoni pri amendoj, tamen ni diskutu dum deko da minutoj pri la eroj. Oni planas voĉdoni pri la dokumento en la venontaj semajnoj aŭ monatoj.
- **Michal (Komitatano A, EUROKKA / Anstataŭanto de Slovakio)** rimarkigas, ke en kelkaj lokoj de la dosiero mankas rilato al fakaj sekcioj kiam oni preparolas nur la landajn sekciojn.
- **Charlotte (Prezidanto):** Komitatanoj povas komenti kaj amendi rekte en la dokumento en la venontaj tagoj, kaj aldonas ke la Estraro organizos pliajn malfermajn horojn por plidiskuti la Strategian Planon.
- **Francesco (Kunsidestro):** La Komitatanoj uzu sian rajton komenti en la dokumento, ne nur hodiaŭ sed ankaŭ dum la venontaj tagoj.
- **Klára (Estrarano):** Memorigas pri sia propono kunigi la estraran planon kaj la proponon de **Rogier** (Estrarano). Tio estus facile farebla.
- **Charlotte (Prezidanto):**
 - Gravas ke ĉiuj partoprenu en ĉi tiu procezo, por ke ĝi vere estu dokumento por ni ĉiuj.
 - Gravas ke ni povu aŭdi la voĉojn de ĉiuj, por ke ni vere estu tutmonda organizo.
 - Membroj de landaj sekcioj povas ankaŭ partopreni kaj skribi al ni aŭ partopreni en la malfermaj horoj.
- **Francesco (Kunsidestro):** Ni nun fermu tiun tagorderon kaj deziras bonan laboron al la Estraro.

2. Ŝanĝproponoj al Reglamenteo

a. Debatoj pri la proponoj

Propono 1 de Robert pri la kunsidaj horoj: aldoni "TEJO uzas la daton kaj horzonon de la Centra Oficejo, krom se alia specifita".

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** prezentas la proponon de **Robert Nielsen**, kiam li estis Komitatano B.
- **Michael Boris (Komitatano B)** proponas kunigon de la du proponoj (la sia kaj tiu de Robert):
 - **Propono de Michael Boris (Komitatano B):** 1.25 "Indiko pri dato kovras la tutan daŭron de la tago laŭ ĉiuj horzonoj." kaj 1.26 "Kiam necesas indiki horon, TEJO uzu almenaŭ la Universalan Tempon (UTC) kaj, se la okazaĵo ne estas plene virtuala, la lokan horon."
- **Lucas (Komitatano A, Francio):** proponas okazigi la parorangan voĉdonadon per Zoom ebligante la elekton inter la pluraj opcioj kaj poste mane mastrumi la traktadon de la datumoj por atingi la rezulton.
- Tiu ĉi propono de **Lucas** estas akceptita kaj li estas pormomente alelektita al la Voĉdona Komisiono, por ke la laboro estu pli rapida.

Voĉdono: Propono A de Robert (Roterdama horzono), Propono B de Michael Boris (UTC), Propono C (neniu ŝanĝo)

(respondebloj eblas laŭorde: jes, ne, egalas, sindeteno)

- A>B : 2, 25, 1; 2
- B>C : 21, 4, 4, 1
- C>A : 16, 8, 4, 2

→ **La propono B estas APROBITA.**

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** tralegas la aliajn proponojn de **Robert**: unue ni diskutos ilin kaj voĉdonos poste laŭvice.

Propono 2 de Robert: La Komitato amendas la Reglamenton pri Elekto de Komitatanoj B forigante la alineon 3.D "Subtenleteroĵ aŭ subtenaj subskriboj de minimume 5 individuaj membroj el minimume 2 landoj."

- **Michael Boris (Komitatano B)** kontraŭas, ĉar li montru minimume emon kaj kapablon trovi kontaktreton.
- **Charlotte (Prezidanto)** opinias same kiel Michael Boris (Komitatano B), necesas havi la subtenleteroĵn.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** samopinias kun **Michael Boris** (Komitatano B).

Propono 3 de Robert: La Komitato amendas la alineon 9.D de la Komitata Reglamento aldonante "per simpla plejmulto" anstataŭ "nur per du-triona plejmulto".

- **Michael Boris (Komitatano B)** kontraŭas ĉar estas grava regulo, povas esti ŝanĝoj, sed nur kiam estas forta kialo.
- **Charlotte (Prezidanto)** konsentas kun **Michael Boris** (Komitatano B), ĉar la nuna regulo estas grava demokratie.

Propono 4 de Robert: La Komitato amendas la alineon 12.4 de la Ĝenerala Reglamento aldonante "la komitatkunsido dum IJK" anstataŭ "ĉiu kunveno de la Komitato"

- **Michael Boris (Komitatano B)** proponas amendon de la propono kun la jena vortumo:
 - La Komitato amendas la alineon 12.4 de la Ĝenerala Reglamento aldonante "la ekfunkcio de la nova Estraro" anstataŭ "ĉiu kunveno de la Komitato".

Propono 5 de Robert: La Komitato amendas la alineon 12.6 de la Ĝenerala Reglamento forigante", pere de skriba peto al la koncerna komisiito".

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** opinias, ke indas havi la formalan peton.
- **Albert (Komitatano A, Filipinoj)** ne konsentas forigi la frazeron de bezono de konfirmo, ĉar estas ĉiam utile havi skriban pruvon de la akcepto de la tasko.

Propono 6 de Robert: La Komitato amendas la Ĝeneralan Reglamenton forigante la alineon 12.9 "Membroj de la komisionoj devas esti rekonfirmitaj de la komisiito aŭ de la Estraro unu monaton antaŭ ĉiu kunveno de la Komitato."

- **Michael Boris (Komitatano B)** proponas amendon de la propono kun la jena vortumo:
 - La Komitato amendas la alineon 12.9 de la Ĝenerala Reglamento aldonante "okaze de la ekfunkcio de la nova Estraro" anstataŭ "unu monaton antaŭ ĉiu kunveno de la Komitato."


b. Voĉdonoj pri la proponoj

Propono 2: La Komitato amendas la Reglamenton pri Elekto de Komitatanoj B forigante la alineon 3.D "Subtenleteroj aŭ subtenaj subskriboj de minimume 5 individuaj membroj el minimume 2 landoj."

- Jes: 4 - 14%
- Ne: 21 - 72%
- Sindeteno: 4 - 14%

→ **NEAPROBITA**

Propono 3: La Komitato amendas la alineon 9.D de la Komitata Reglamento aldonante "per simpla plejmulto" anstataŭ "nur per du-triona plejmulto".



KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- Jes: 9 - 31%
- Ne: 14 - 48%
- Sindeteno: 6 - 21%

→ **NEAPROBITA**

Propono 4: La Komitato amendas la alineon 12.4 de la Ĝenerala Reglamento aldonante "la ekfunkcio de la nova Estraro" anstataŭ "ĉiu kunveno de la Komitato".

- Je: 18
- Ne: 3
- Sindeteno: 8

→ **APROBITA**

Propono 5: La Komitato amendas la alineon 12.6 de la Ĝenerala Reglamento forigante ", pere de skriba peto al la koncerna komisiito".

- Jes: 9 - 31%
- Ne : 16 - 55%
- Sindeteno: 4 - 14%

→ **APROBITA**



Propono 6: La Komitato amendas la alineon 12.9 de la Ĝenerala Reglamento aldonante "okaze de la ekfunkcio de la nova Estraro" anstataŭ "unu monaton antaŭ ĉiu kunveno de la Komitato".

- Jes: 17 - 58%
- Ne: 3 - 10%
- Sindeteno: 9 - 31%

→ **APROBITA**

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** prezentas la aliajn proponojn.

Propono 7 de Robert: La Komitato amendas la Reglamenton pri voĉdonadoj forigante la artikolon 2 "Paroranga Metodo." kaj sekve malaltigas je 1 la numeron de la sekvaj artikoloj kaj amendas la artikolon 3.1 aldonante "kun limigita kvanto da venkantoj okazu" anstataŭ "pli ol unu venkanto povas okazi".



KOMITATKUNSIDO

NOVEMBRO 2020

- **Michael Boris (Komitatano B), Lucas (Komitatano A, Francio), kaj Emerson (Anstataŭanto de Meksiko):** esprimas kontraŭon por tiu ĉi propono.

Voĉdono:

- Jes: 1 - 4%
- Ne: 21 - 75%
- Sindeteno: 6 - 21%

→ NEAPROBITA

Propono 8 de Robert: La Komitato amendas la alineon 5.1 de la Komitata Reglamento aldonante "du fojojn jare" anstataŭ "unu fojon".


- **Rogier (Estrarano)** ne vidas utilon havi du ordinarajn kunsidojn - pli bone ni strebu al plia efiko: ni voĉdonu rete kiel eble plej.
- **Michael Boris (Komitatano B)** kontraŭas.
 - Ni scias ke la dato de IJK ne estas fiksita, kaj pli bonas ke ĝi estu eksterordinara.
 - La dato ja estas anoncita antaŭe por ke la Komitatoj povu organizi sian vivon por ĝin partopreni.

Voĉdono:

- Jes: 9 - 32%
- Ne: 14 - 50%
- Sindeteno: 5 - 18%

→ NEAPROBITA

1. La Komitato amendas la alineon 5.1 de la Komitata Reglamento aldonante "du fojojn jare" anstataŭ "unu fojon".



- **Francesco (Kunsidestro):** Ne plu restas proponoj por voĉdonoj, ni iru al aliaj temoj.

3. Aliaj temoj

- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** klarigas, ke povus okazis teknika problemo dum la voĉdono lanĉita antaŭe en Centra Reto, tiukaze oni restartigos tiun voĉdonon.

4. Ceteraĵoj

- **Rogier (Estrarano)** anoncas tiele:

Karaj TEJO-anoj

Komitatanoj

samestraranoj

ĉiuj Zam-infanoj

levu la manojn

heligu ekranojn
heligu, heligu
pretigu la planojn
pretigu, pretiĝu

por seshora sesio
senĉesa ekscio
ekscito, defio
por mondasocio

dependas finance de la konsilio
buĝete balance pro Eŭropunio
kongresmalbonŝance en kronpandemio
kaj VolDom' nun france pri tio nun ĉio

jen io aldona
en tempo malbona
en jar' de korona
mesaĝo persona

sciigas ĝisdata
ke mi kaj Agata
reciproke amata
infano kreata
por majo planata
kaj mi iĝos Tata

de propra eta ido
fino de l' komitatkunsido

- **Albert (Komitatano A, Filipinoj);**
 - dankas la partoprenintojn kaj volas atentigi ke ni vere bezonas zorgi pri la revivigo de Landa kaj Faka Agado.
 - Malfermas alvokon por vickomisiita posteno kaze de sia elektiĝo, speciale por interesitoj el Ameriko, Azio kaj Afriko.
- **Konstanze (Ĝenerala Sekretario)** dankas Francescon (Kunsidestro) kaj ĉiujn protokolantojn kaj provlegantojn pro la glata organizo de la Kunsido.

- **Charlotte (Prezidanto)** dankas ĉiujn, speciale la estraranojn kaj diras ke laŭ la tempo ni pliboniĝos.

La Komitatkunsido estas fermita sen bezono de plia plilongigo.